



ESPERANTO

DECEMBRO 1962

55 a Jaro - N-ro 685 (12)

esperanto

DECEMBRO 1962

5 5 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 685 - (12)

Fondinto : H. HODLER

D-ro V. Sadler, adreso ĉe la Centra Oficejo.

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1963) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en pli ol 80 landoj.

Estrarar de U.E.A. :

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, H. P. Olsens Vaenge 37, Taastrup, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

Solena malfermo de IV-a Ĉebalta Esperanto-Tendaro. La plej juna esperantistino (9 jara) Aija Strautmane legas propreverkitan saluton al tendaranoj.

Enhavo

Nia lingvo kaj nia literaturo	205
Esp. Movado en japanaj altlernejoj	206
La utilo de Esperanto	210
Artistoj kaj fotoartistoj	211
Esp. instruado al gepacientoj	212
La Laborplano de UEA je kluba nivelo	212
Kongreso (Avoto)	213
D-ro Zamenhof-parko (S.S. de Jong)	213
La Sofia nacia operteatro	214
El la Centra Oficejo	220
La kirila alfabeto	220
La Ĉambroj de UEA	220
Baldaŭ aperos la neeldonita verko	220
Respondo al letero en no. 9	221
Multaj fluetoj faras grandan riveron	223

Rubrikoj

CED	208
La lingva ĥaoso	209
Ricevitaj libroj	213
Nia Forumo	215
Tra la Mondo	216
Esperantista Vivo & Nekrologo	217
19-a TEJO-kongreso	217
La Juna Vivo	218
48-a U.K.	219
Radio	219
Ŝaka rubriko	220
Oficiala Informilo	222

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

NIA LINGVO KAJ NIA LITERATURO

Tradicie la esperantistoj, dum la monato decembro, turnas siajn pensojn pli ol kutime al la literaturo de Esperanto, tute aparte al la literaturo originale verkita en la internacia lingvo. Tute prave oni ĉiujare atentigas, ke la literaturo estas grava faktoro en nia movado, kaj en la starigado de kulturaj kontaktoj kaj interŝanĝoj inter la popoloj. Nia literaturo estas garantiaĵo de la lingva unueco, impona manifestacio pri la idea bazo de la esperantismo, kaj konstanta pruvo pri la neelĉerpebla esprimkapablo de la vivanta Esperanto. Ankaŭ dum 1962 aperis multaj novaj libroj, inter kiuj speciale menciinda estas la nova eldono de la "Proverbaro Esperanta", tiu grava sed jam delonge nehavebla fonto de lingva inspiro kaj ĉefverko de poezia genio.

Turnante nian atenton al la Dua Baza Laborplano de U.E.A., ni trovas kompreneble, ke la literaturo estas en ĝi traktita. Ekzemple, unu tasko estas "publikigi almenaŭ trifoje jare altnivelan kulturan revuon": tion U.E.A. jam entreprenis, eldoninte la unuan numeron de la nova kvaronjara revuo "Monda Kulturo", kiun la legantoj espereble jam ekkonis kaj abonis. Ne estas eble, ke mi, kiel la redaktoro de tiu revuo, esprimu opinion pri tiu unua numero; ni atendas la reagon de la publiko kun streĉa scivolo; sed, okaze de nia decembra festo, eble ne estas malbone atentigi, ke tiu revuo estos dediĉita al la originala verkado en Esperanto. Unu-du amikoj jam esprimis dubon, ke nia originala kulturo estas jam sufiĉe forta por tia entrepreno. Mi mem estas konvinkita, ke ĝi estas sufiĉe forta, kaj mi estas certa, ke la estonteco pruvos mian pravon. Inter la esperantistoj, kiel tion pravas la originalaj libroj eldonitaj dum la lastaj jaroj, troviĝas granda nombro de talentuloj, kies verkojn ŝatas la publiko, kaj kiuj kapablas daŭrigi niajn tradiciojn kaj krei ĉiam pli potencon nukleon de internacia kulturesprimado.

En la sama paragrafo de la Laborplano estas menciitaj ankaŭ aliaj literaturaj taskoj. Inter ili estas daŭrigo de la serio "Oriento-Okcidento"; tiurilate mi povas menci, ke tuj — eble jam dum vi legas ĉi tiujn liniojn — estos eldonita nova speciala verko en tiu serio: la kompleta "Dia Komedio" de Dante, en luksa eldono. Detalojn pri tio vi legos aliloke. Oni rimarkas, ke la Laborplano emfazas la gravecon de valoro kaj altniveleco de la eldonaj programoj. El vidpunkto de la prestiĝo de nia afero, la kvalito kaj graveco de la eldonataj verkoj, ĉu beletraj ĉu sciencaj ĉu teknikaj, estas treege atentinda. Eĉ la popularaj verkoj, kiel ajn trivialecaj, devus, ekzemple, celi altan kaj neri-proĉindan lingvan nivelon.

Ankaŭ tiun flankon de la afero pritraktas la Laborplano, ĉifoje en para. 7. Interalie, oni devas "atenti, ke ĉiuj publikaĵoj de U.E.A. estu absolute senriproĉaj el lingva vidpunkto". Verŝajne neniu volas malkonsenti tion. Tamen ne tiel facile plenumebila ĝi eble montriĝas; kelkfoje la esperantistoj riproĉas ion, kio vere ne estas riproĉinda. Tro ofte oni havas iom individuan opinion pri lingva vidpunkto, aŭ rigardas kiel korektan nur unu el du aŭ kelkaj pli-malpli paralelaj formoj. Ekzistas ankaŭ emo kliŝigi la lingvon kaj malhelpi la liberan manipuladon de la lingva materialo. Ekzemple, ni ricevis lastatempe de tre bona amiko de nia afero, kies sola celo, cetere, estis kaj estas helpi al la atingo de la supre citita dezirinda stato, liston ne mallongan (ĝi ampleksas kvar dense tajpitajn paĝojn) de lingvaj punktoj trovitaj en la oktobra numero de "Esperanto"; kiujn li opinias malbonaj. El ili, proksimume naŭ estis evidentaj preseraroj, kaj tio estas konata malbonaĵo, al kies solvo nia redakcio eble jam alproksimiĝas. Pri aliaj kvar, aŭ eble kvin, nia kritikanto estas prava, kaj ni dankas lian atenton. Sed el la ne malmultaj aliaj ni konstatas, ke preskaŭ ĉiuj estas esprimo nur de persona opinio.

Ĉi tie oni ne havas spacon por trakti la kritikojn detale, sed eble li pardonos al mi, se mi citos unu specimenon, por subteni mian tezon. Ekzemple:

"Paĝo 173, dua kolumno: mi notas unufoje 'kun aparta konsidero de jenaj taskoj', kaj aliffoje: 'kun aparta konsidero al jenaj taskoj'. La uzo de la prepozicioj en Esperanto ĉiam estis sufiĉe libervola kaj ŝancela. Ĉu UEA en siaj publikaĵoj ne devus unuecigi plejeble multe korektan uzadon de la prepozicioj?"

Nu, unue, se ni turnas nin al Zamenhof, ni trovas prepozician libervolon kaj ŝancelon, ekz-e: "Malĝojo al li rabas la feliĉon" (Ifigenio, I:1, verso 17); kaj "la tutan ĝuon/De l' viv' ĝi de vi rabas" (Ifigenio, I:2, versoj 71-2). Due, la rigoreco de la prepozicia uzado en aliaj lingvoj, ekzemple la angla, estas ĝuste unu el la faktoroj, kiuj malfaciligas ilian lernadon, eĉ fare de denaskaj parolantoj de la koncerna lingvo! Se ni trudus diktatorece nur unu formon en ĉiu kazo, tio nepre malfaciligus ankaŭ Esperanton, ĉe kiu la komprenebleco estas unu ĉefa kriterio pri la normo. Mi ne volas nude aserti, ke nia amiko estas malprava; sed el redakta vidpunkto mi opinias malutile por la afero entute, devigi ĉiujn al ia "ortodokseco".

Resume, ni daŭrigos niajn klopodojn atingi, ke la lingvaĵo de niaj eldonaĵoj estu senriproĉa; sed ni ankaŭ ne rajtas, laŭ nia opinio, trouzi la cenzuran kraĵon.

W. Auld

Esperanto-Movado en Japanaj Altlernejoj

de Okumura-Rinzo

Japanujo



S-ro Okumura-Rinzo.
Samideano de 1930, FD de UEA,
instruisto de Ikuno Altlernejo.

En Japanujo la altlernejo estas nedeviga kurso de 3 jaroj kaj akceptas geknabojn de 16-18 jaraĝajn.

Antaŭ 30 jaroj, unu knabina altlernejo en Tokio donis oficiale programitan lecionon de Esperanto al unu klaso. Kelkajn jarojn poste ĝi malaperis kaj de tiam neniuj altlernejoj havas programitan lecionon de Esperanto.

Post la milito nia eduka ministerio stimulis eksterlecionan memstudon, nomatan klub-movado kultura kaj sporta, kaj nun la Esperanto-lernado estas unu en la kadro de tiu klub-movado. Tia Esperanto-klubo, kun nomo de aŭ societo aŭ fako, troviĝas en iom multaj altlernejoj lastatempe.

En adresaro de Japana Esperanto-Instituto troviĝas 34 altlernejoj kiuj havas Esperantoklubon en 1957, 40 altlernejoj en 1958, kaj ĉiam plimultiĝas iom post iom.

Antaŭ monatoj la Esperanto-Societo de Ootemae Altlernejo enketis la rezulton kaj 26 altlernejoj tuj respondis al ĝia leterenketo pri sia Esperanta movado. Konataj el ili estas: Kaŭagoe-Knabina, Toohoo-Gakuen, Niigata-Ĉuuo, Takaoka-Komerca, Hamamacu-Teknika, Ŝeien-Knabina, Ikuno, Ootemae, Niŝinomija-Urba, Niŝinomija-Gubernia, Koojoo-Gakuin, Mijahara, Boofu kaj Hukuoka-Komerca Altlernejoj.

Ordinara jarprogramo de altlernejaj Esperantokluboj estas jena:

En aprilo, novaj gelernantoj multope envenas en altlernejon kaj ilin atendas diverskoloraj afiŝoj kaj privataj predikoj per kiuj kaptiĝas unuajaruloj al la klubo. Post monato aŭ monatoj kelkaj el ili ekŝiĝas kaj la varbado daŭras dum la tuta jaro.

Klubanoj kunsidas kutime, kelkfoje semajne (ordinare 2 aŭ 3 foje), lernas la lingvon kaj komencas internacian korespondadon. La kunsidon gvidas geklubanoj mem reciproke, aŭ la instruisto de tiu lernejo. Tiu instruisto nomiĝas aŭ konsilanto aŭ klubestro. Por esti registrita klubo, la klubo devas havi instruisto-konsilanton kaj difinitan nombron da membroj. Al klubo havas ekskurson en najbaraj lokoj en dimanĉo aŭ en feriaj tagoj.

En aŭtuno, multaj altlernejoj havas Kulturan Feston (Lernejan Feston) kaj tiam Esperanto-klubo ekspozicias korespondaĵojn, librojn kaj afiŝojn por konigi la ekziston kaj la utilecon de la Internacia lingvo kaj varbas novajn membrojn.

En jarfino, la geklubanoj reelektas komitaton konsistantan el ĉefo, kasisto k.a., kaj unuajaruloj aloficiĝas anstataŭante la ermitiĝantajn duajarulojn.

Pri la kaso de klubo, ordinare la lerneja komunumo donas subvencion kaj registrita klubo ricevas, en iu lernejo 1000 jenojn, en alia 5000, 10000 jenojn aŭ pli por unu jaro, laŭ la decido de la ĉiujara komunuma kongreso.

La kotizo kiujn la membroj pagas monate estas 30 jenoj, 50 jenoj, iam 100 jenoj.

La fatala malfacilo de altlerneja Esperanto-movado kuŝas en la trofua ermitiĝo de komitato.

La novaj geknaboj aniĝas en aprilo kaj en aŭtuno aŭ en vintro, plej malfrue en marto de la sekventa jaro, ili jam estas komitatanoj kun nesufiĉaj scioj pri la lingvo kaj la movado, kaj post unu jaro jam ili, iom lertaj en la lingvo kaj la movado, ekŝiĝas aŭ ermitiĝas for de la movado, ĉar ili devas prepari por la severa ekzameno de grandlernejo (universitato). En Japanujo, 50-60% de la altlernejanoj kandidatas kaj 30% sukcese akceptiĝas en grandlernejoj, malpli ol 15% akceptiĝas en t.n. bonaj grandlernejoj. Iuj restas en la klubo ĝis la fino de la tria jaro, se ili okaze estas ne entuziasmaj por la preparo de la enir-ekzameno, aŭ okaze ili ne kandidatas pro kaŭzo de ekonomio aŭ talento. Tie la konsilanto-instruisto falas en dilemon, ĉu restigi laboremajn klubanojn en la klubo, ĉu tiajn energiajn talentajn anojn sukcese preparigi por la ekzameno.

Plie, la unuajaruloj estas ne sufiĉe edukitaj en la lernado de oficiala leciono de la angla lingvo, kaj la kunlernado de la du por orientanoj tute konfuzige samliteraj lingvoj malhelpas la lecionon de la angla lingvo. Oni informas, post kelkaj eksperimentoj en eŭropaj landoj, ke Esperanto-lernado helpas la lernadon de alia lingvo. Tamen japanaj instruistoj-Esperantistoj ne kuraĝas praktiki tion, plene entuziasmigi geknabojn en Esperanta afero, pro timo de hazarda malaltiĝo ĉe la flanko de la oficiala leciono de angla lingvo.

Car la vivtempo de geklubanoj estas tiel mallonga, la akso de Esperanto-movado estas la instruisto-gvidanto. Sen taŭga instruisto ĝi regresas kaj mortas, kun bona gvidanto ĝi plenfloras, kaj kun senlaca konsilanto ĝi postvivas.

Unu ekzemplo montriĝas en Ikuno Altlernejo. En 1950, la nuna altlerneja sistemo estis nove starigita post la milito, kaj tuj en Ikuno Altlernejo, Osaka, fondiĝis Esperantoklubo kiu vivas jam ĝis nun 13 jarojn kaj havas la plej longan historion inter altlernejaj Esperanto-kluboj en Japanujo.

La unuan jaron ĝi ricevis subvencion, kiel registrita klubo, de 700 jenoj. La sumo multiĝis kaj en 1961 ĝi ricevis 7100 jenojn. La kotizo estas monate 30 jenoj, sed oni pagas ne ĉiumonate ĉar la subvencio kovras preskaŭ la tutan elspezon de la klubo.

Gelernantoj aniĝas, eksigas, ermitiĝas, sed ĉiujare 10-40 geknaboj estas listigitaj en la membro-adresaro. En majo 1962, 21 gelernantoj estas en la membrolisto, kaj trifoje en semajno (lunde, merkrede kaj ĵaŭde) kunsidas, de 15.30 ĝis 17.00 h. post la leciono. Por esti registrita klubo oni devas havi pli ol 10 membrojn.

En Lerneja Sporta Konkurso okazis inter-kluba stafetkuro (1950-1957), kaj nia Esperanto-klubo partoprenis propagande kun Verda Standardo, foje ricevis la unuan premion, la arĝentan pokalon.

En Kultura Festo, kutime nia klubo ekspozicias librojn, afiŝojn kaj korespondaĵojn kun bona reputacio.

La Zamenhofa Festtago ĉiam koincidas kun la lerneja ekzameno kaj la klubo ne povas utiligi la memorindan okazon.

Ĉiujare la ĉeflaboranta komitano ricevis dankskribaĵon de la lernejestro, okaze de la jarfina ceremonio en marto, ĝis la honorigo ĉesis en 1961.

La oficiala diplomo de Esperanto-instruado en altlernejo estis donita al s-ro Hosoi-Sueo en Jakumo Altlernejo, Hokkaido, en 1952, de la Eduka Komitato, kaj en la sama jaro s-ro Terai-Riĉi en Fuzimori Mezlernejo ricevis de Gubernia Eduka Komitato de Kioto la diplomon por mezlernejo. La du estas la solaj oficiale rajtigaj diplomoj de Esperanto-instruado en japanaj lernejoj kvankam ili estas praktike utiligitaj neniam ĝis nun.

La ligo de altlernejaj Esperantistoj estis longe atendata, sed la preparo por la enirekzameno al grandlernejo

baris al la klubanoj fordoni sian tempon al la fondo de la ligo, bezonanta pli multan tempon kaj penon ol teni sian klubon viva, kio estas jam unu granda laboro. Kaj eĉ se ĝi estus fondita, ĝin elteni estas pli granda malfacilo. La spertaj gvidantoj en altlernejoj jam bone komprenis la situacion kaj ne rapidis havi la ligon. Sed la ĝermo establi la ligon estis ĉiam kreskanta.

En 1958, en junio, Niŝinomija-Urba Altlernejo alvokis kelkajn klubojn por interkonsiliĝi pri fondo de ligo, ne tutlanda sed distrikta, kaj intencis la fondon de Hanŝin Altlerneja Esperanto-Ligo (Han=Osaka, Sin=Kobe), nome nur du-gubernia. Al ĝi kunsidis 3-4 altlernejoj. En junio 1959, la 2-a kunsido havis lokon en Ikuno Altlernejo, kaj ĉeestis nur du altlernejoj, ĉar en alia lernejo en la distrikto jam ne troviĝis laboremaj klubanoj.

En julio 1961, al Niŝinomija-Urba Altlernejo denove kolektiĝis reprezentantoj el 5 altlernejoj. Novembre en la sama jaro Ikuno Altlernejo okazigis la 4-an kunsidon ĉe si kun ĉeesto de 3 altlernejoj, kaj post diskuto estis decidita iom detale la jarprogramo de la ligo, i.a. la eldonado de ĝia organo per laboro de geklubanoj de Ikuno Altlernejo.

Post du monatoj, januare 1962, eliris la n-ro 1 de la organo, 12-paĝa, kun la nomo "La Verda Stelo".

En februaro 1962, la 5-a kunsido estis okazigita en Kobe Altlernejo, kie ĉeestis 4 lernejoj kaj oni decidis ke la oficiala nomo estu Hanŝin Altlerneja Esperanto-Ligo, Suma Altlernejo laboru por la n-ro 2 de la organo en 2-paĝa formo, la 6-a kunsido estu ĉe Ootemae Altlernejo kaj pri administranta klubo, pri kotizo, ekskurso, intersanĝo de amikeca vizito kaj aliaj.

Tiamaniere la sola Esperanto-ligo de altlernejaj Esperanto-kluboj finfine fondiĝis en Japanujo. Sed ĉu ĝi povas vivi ĝis 1965 kaj bonvenigi la gastojn de la 50-a Universala Kongreso? Ĉio dependas tute de la senlaca entuziasmo de la konsilantaj instruistoj de la aliĝantaj Esperanto-kluboj.

P.S. La trunko de japana lerneja sistemo estas malgrandlernejo-mezlernejo-altlernejo-grandlernejo.



Geklubanoj de altlerneja Esperanto-klubo, okaze de ĝia ekspozicio.

Monato de donacoj: Vidu la libroliston en la Jarlibro!



Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJ EN 1962/1963

ALVOKO DE C.E.D. AL GEINSTRUISTOJ

En la nuna stadio de la klopodoj vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj, estas absolute necese havi kiel eble plej fidindajn kaj plej kompletajn informojn pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata nuntempe, nome en la lerneja jaro 1962/1963.

C.E.D., do, afable petas ĉiujn geinstruistojn, kiuj instruas Esperanton en la lernejoj de kiu ajn grado en la jaro 1962/1963, respondi al la suba demando kaj sendi sian respondon al la kunlaboranto de C.E.D. por lerneaj statistikoj *S-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo*. C.E.D. presigis poŝtkarton kun la samaj demandoj por faciligi kaj simpligi ĝis maksimumo la respondojn. Sekve, ĉiu instruist(in)o povas aŭ respondi laŭ la suba demando nepre per aparta letero aŭ poŝtkarto, aŭ peti de S-ro Kennedy la demandaron presitan sur aparta poŝtkarto.

Tuja sendo de la petitaj informoj multe helpas al S-ro Kennedy plenumi akurate tiun ĉi malfacilan taskon, sed bv. noti, ke la respondoj en ĉiu okazo devas atingi S-ron Kennedy nepre antaŭ la 1-a de aprilo 1963. Tuj post tiu dato S-ro Kennedy kompilos ĝeneralan trarigardon de ĉiuj lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata en tiu ĉi jaro, kaj la trarigardo aperos en la junia numero de la revuo "Esperanto". Pri la rezultoj C.E.D. publikigos ankaŭ apartan dokumenton.

C.E.D. anticipe dankas al ĉiuj geinstruistoj, kiuj helpas ĝin en tiu ĉi grava nova enketo per tuja respondo.

D e m a n d a r o

LERNEJOJ EN KIUJ ESPERANTO ESTAS INSTRUATA EN LA JARO 1962/1963

1. Lando :
2. Urbo :
3. Nomo de la lernejo
4. Grado E (elementa)
M (mezgrada)
A (alta, ekz. universitato)
5. Tipo m (miksita)
a (nur knaboj)
b (nur knabinoj)

6. Kiom da lernantoj de Esperanto :
knaboj ? knabinoj ?
7. Kondiĉoj de instruado:
O (oficiala) aŭ NO (neoficiala)
D (deviga) aŭ ND (nedevisa)
K (en la kadro de la lerneja programo) aŭ EK (ekster ĝi)
8. Dum kiom da jaroj oni jam instruis Esperanton en la lernejo ?
9. Antaŭnomo kaj nomo de la instruist/in/o
10. Adreso de la lernejo :

(**Bonvolu** : plenigi la demandaron preslitere uzante la indikitajn mallongigojn, kaj sendi antaŭ la 1-a de Aprilo 1963 al S-ro D. Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co Durham, Britujo.

AGADO DE KUNLABORANTOJ DE C.E.D. EN AZIO KAJ AFRIKO

D-ro Victor Sadler, kunlaboranto de C.E.D. pri fonetiko kaj lingva psikologio, forveturis en julio ĉi-jara al Cejlono por fakaj studoj kaj disvastigo de la Internacia Lingvo. Dum sia nur kelkmonata restado tie, li faris bonegan laboron. En Kolombo li prelegis en Universitato, Politeknika Kolegio, diversaj lernejoj. Entute li faris 12 prelegojn al ĉ. 1000 personoj, el kiuj 125 geinstruistoj. En la anglalingvaj ĵurnaloj de Cejlono aperis 11 informoj, unu artikolo kaj unu letero pri Esperanto, sed verŝajne pluraj aliaj informoj ne atingis lin. En la anglalingva radio okazis unu intervjuo kaj 10-minuta parolado, kiu estis ripetita en oktobro. Tiu parolado aperos presite en "Radio Times". Trifoje aperis reklamoj pri koresponda kurso en anglalingvaj ĵurnaloj. D-ro Sadler kompilis "Budhisman Terminaron", kiu jam estas eldonita en 50 ekzempleroj de Buddhist Publication Society. Lia "Esperanta-Sinhala Vortareto" estis presata de la Universitato de Cejlono komence de oktobro kaj verŝajne ĝi nun estas jam presita. Malgraŭ tiu granda informa kaj verkada laboro, D-ro Sadler trovis tempon ankaŭ por instrui la lingvon. Entute ĉ. 50 personoj sekvis liajn kursojn. Kelkaj ricevis personan intensan instruadon kaj ili jam kapablas konversacii. Antaŭ la foriro el Cejlono D-ro Sadler okazigis fondkunvenon de Cejlona Esperanto-Societo. Statuto kaj 15-punkta laborplano estis akceptitaj. La sekretariino-kasistino de la nova societo estas F-ino S. Raĝaratnam, 22 Canal Lane, Colombo 6, Cejlono. Al la agado de D-ro Sadler en Cejlono multe helpis D-ro Dharmatilaka, F-ino Raĝaratnam kaj Sanghano Nianasatta Thero.

Post sia trimonata restado en Cejlono, D-ro Sadler forvojaĝis al Hindujo, kie li restis unu monaton. Li nun troviĝas survoje al Eŭropo kaj komencos sian laboron en la Centra Oficejo de U.E.A. meze de decembro. En la januara numero de "Esperanto" aperos analiza artikolo pri lia agado kaj spertoj.

SUBTENU CED, LA SOLAN SCIENCAN INSTITUCION DE LA MOVADO

Alia kunlaboranto de C.E.D. Lic. Tibor Sekelj, gvidas, kiel konate, la Karavanon de Amikeco tra Afriko. Laŭ lia lasta letero de la 21-a de oktobro, la vojaĝo evoluas laŭplane. En Somalio li havis interparolojn kun la Ministroj de Edukado kaj Informado, kaj kun pluraj altaj funkciuloj de tiuj du kaj de kelkaj aliaj Ministerioj. En la konversacioj li, kompreneble, tuŝis la demandon de la Internacia Lingvo. Lic. Sekelj faris prelegon al la studentoj de la Universitato de Mogadiŝo kaj en la Universitata Instituto. En Kenjo la ĉefa ĵurnalo "East African Standard" publikigis tre simpatian raporton pri la Karavano kaj Esperanto ricevis bonegan mencion. La artikolo altiris multajn vizitantojn al la tendaro de la Karavano kaj preskaŭ ĉiuj interesiĝis pri Esperanto. En Kenjo li ĉefe kontaktis la turismajn aŭtoritatojn. Entute, laŭ la letero de Lic. Sekelj, la Karavano estas renkontata kun simpatio kaj ĝi faras tre efikan laboron por Esperanto.

Artikolo de s-ro Sekelj aperis en la novembra numero de la revuo "Esperanto".

Al D-ro Sadler kaj Lic. Sekelj C.E.D. esprimas koran gratulon pro la efika laboro en la intereso de la Internacia Lingvo.

ESPERANTO EN UNESKO PUBLIKAĴOJ

De tempo al tempo C.E.D. publikigis en tiu ĉi rubriko informojn pri Esperanto en diversaj dokumentoj kaj publikaĵoj de UNESKO. La lasta informo aperis en la revuo "Esperanto" de decembro 1961. Intertempe pluraj novaj informoj aperis en la publikaĵoj de UNESKO. El la pli gravaj informoj, menciinda estas tiu pri la Seminario "Oriento-Okcidento", okazinta en Londono en aŭgusto 1961. Ĝi aperis en la revuo "Orient-Occident", n-ro 3 de junio 1962. Grava dokumento de UNESKO - UNESKO/ED/189 de la 3-a de majo 1962 — pritraktas la metodojn por antaŭenigi inter la junularo la idealojn de paco, reciproka respektado kaj interkompreniĝo de la popoloj. Tiu 71-paĝa dokumento plurfoje akcentas la lingvan problemon kiel obstaklon al la realigo de la plano. La starpunkto de U.E.A. estas prezentita en diversaj lokoj de la dokumento, ekzemple sur pp. 15, 31, 36, 47, 51, 59, 63. Eble estas utile menci, ke la dokumento estis preparita de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO responde al 2 rezolucioj akceptitaj de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO. Unue la Ĝenerala Direktoro de UNESKO sendis al U.E.A. kaj al aliaj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO tiel nomatan bazan projekton por diskuto. Studinte atente la dokumenton, U.E.A. per sia ampleksa letero de la 29-a de decembro 1961 faris siajn komentojn kaj aldonis 18 dokumentojn de C.E.D. por apogi sian starpunkton. La menciita

letero kaj la aldonitaj dokumentoj servis kiel bazo por la komentoj pri la lingva aspekto de la klopodo de U.N. kaj UNESKO en la dokumento UNESKO/ED/189.

MALLONGAJ INFORMOJ

S-ro N. R. Smith, B.Sc., kunlaboranto de C.E.D. kaj estinta Estrarano de U.E.A., akceptis postenon de docento en la Kwame Nkrumah Universitato de Sciencoj & Teknologio, Kumasi, Gano. S-ro Smith plue restas aktiva kunlaboranto de C.E.D. kaj plenumas diversajn gravajn funkciojn en U.E.A. Gratulon kaj bondezirojn por sukcesplena laboro!

F-ino Marjorie Boulton, M. A., B. Lit., kunlaborantino de C.E.D. por edukaj kaj literaturaj demandoj, publikigis bonegan 3-kolumnan artikolon sub la titolo "Lingvo de Amikeco Helpus la Unuecon de Afriko" en la granda semajna periodaĵo de Gano "New Ashanti Times". F-ino Boulton fariĝis direktorino de "The Charlotte Mason College" en Ambleside, Westmorland, Britujo. Ankaŭ al ŝi gratulon kaj bondezirojn por sukcesplena laboro.

D-ro Victor Sadler, kunlaboranto de C.E.D. pri fonetiko kaj lingva psikologio, verkis artikolon pri la Mezurado de Internacieco. La artikolo, verkita por C.E.D. kaj bazita plene sur statistikaj informoj rilate U.E.A., aperis en "International Associations", n-ro 7 de julio 1962. La artikolo estas alte taksata en la neesperantistaj medioj.

Pri la Konsultaj Rilatoj inter U.E.A. kaj UNESKO aperos iom detala informo en la sekvanta numero de "Esperanto".

Donacoj por C.E.D.

	£	ŝ	p
Stato de la 12-a de oktobro 1962	141	0	11
S-ro E. F. Dean, Britujo	3	3	0
S-ro H. Brown, Britujo	1	0	0
Stato je la 31-a de oktobro	145	3	11

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenas finance ĝian laboron. Ĉi-foje CED esprimas tute apartan dankon al s-ro E. F. Dean, Britujo, kiu en tiu ĉi jaro faris al CED 5 donacojn, entute de £ 15-3-0. Krome li sukcese petis siajn amikojn subteni CED. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

LA LINGVA HAOSO

"Mia okjara filo tre bone progresis en la lernejo ĉi tiun jaron, ĝis lia instruistino foriris. Lia lernado konsiderinde malprogresis, kaj je mia esplorado li respondis, ke li ne komprenas sian novan instruistinon. Kiam mi vizitis lian lernejon, mi trovis, ke lia instruistino estas skota kaj parolas tre skotdialekte. Certe tiaj malhelpaĵoj devus ne esti permesataj en la elementaj lernejoj, kie korekta prononcado estas necesega?"

Laŭ la leterrubriko de aŭstralia gazeto. (Noto: En Skotlando kaj en Aŭstralio oni kompreneble parolas la saman lingvon — t.e., la anglan).

CED EKZISTAS 10 JAROJN; ĈU VI HONORIGIS ĜIN PER DONACO?

LA UTILOJ DE ESPERANTO

La problemo pri internacia lingvo tre frue komencis sin trudi al la homa penso. La modernaj veturiloj igis la homon pli facile movebla kvazaŭ la tero fariĝis pli eta. Nun ne unuopuloj, sed grandaj homamasoj ĉiam pli kaj pli ofte kaj facile sukcesas fizike atingi aliajn homamasojn. Paralele kun tio tuj oni eksentis bezonon ankaŭ spirite atingi unu la alian kaj tio estas ebla nur pere de la parola kaj skriba komunikado inter la homoj. Kaj jen, antaŭ ni estas nenio alia ol la problemo pri internacia lingvo. Ĝiaj elementoj de longe komencis kreiĝi en la sino de la naciaj lingvoj, en la sino de la tuta homaro. Pri la detaloj tiurilate ni jam havis okazon paroli kaj certe ni havos novajn okazojn paroli kaj diskuti. Ĉi momente estas grave, ke la homo en la persono de sia genia filo d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof sukcesis trafte solvi la problemon kreante Esperanton.

La unuaj adeptoj kaj pioniroj de Esperanto estis kuraĝaj junaj homoj. Kaj tio estas natura fenomeno. La junuloj, la junularo, ĉiam unuaj komprenas kaj akceptas la novajn ideojn, ĉiam unuaj akceptas, komprenas kaj ekutiligas la novajn eltrovaĵojn. La kreo de Esperanto estas realiĝo, perfekta realiĝo de la homa strebo al socia kaj kultura progreso. Ne gravas, ke ankoraŭ estas homoj kiuj restas miopaj, aŭ simple fermas la okulojn kaj neglektante la vivajn faktojn daŭrigas serĉi la solvon de la problemo en fora estonto, laŭ vojo de scienca sintezo de ĉio valora nun trovebla en la naciaj lingvoj. Ankoraŭ estas homoj, kiuj tute ne komprenas la rolon de la aparta persono, en la okazo la rolon de D-ro Zamenhof, en la homa progreso. Estas homoj, kiuj pro iaj kaŭzoj, certe ne homamaj kaj bonintencaj, rilatas al Esperanto kiel al afero absolute persona, privata, hazarda elpenŝaĵo de homo sinamuzanta, do afero nesperioza. Tiuj homoj malantaŭ bombastaj frazoj kiel "Tio kompreneble ne estos hazarde kreata de apartaj homoj artefarita lingvo. Ĝi kreiĝos, pliriĉiĝos kaj estos progresigata kiel de la sciencistoj kaj de la lingvistoj, tiel ankaŭ de la larĝaj popolamasoj, de la tuta homaro surbaze de la kono kaj utiligo de objektivaj leĝoj pri la progreso de la lingvoj"*, kaŝas sian nekompetentecon kaj tute malbonan informitecon. Ja, ĉio ĉi estas aplikata kaj konsiderata ĉe Esperanto. Pri tiaj homoj oni diras: Se li dormas, la plej eta bruvo vekos lin, tamen se li nur ŝajnigas dormadon, eĉ kanonado de mil pafitegoj ne vekos lin.

Sed ĉar estas tiaj homoj, des pli ni devas nin adresi al la junularo, kiu puŝas antaŭen la progreson kaj kiu estas la plej bona garantio pri baldaŭa sukceso. Kaj ĉar temas pri iom pli intelekta afero, speciale ni devas atenti la studentan junularon, ĉar la estontaj fakuloj, kompetentaj gvidantoj de la entreprenoj, de la vilaĝoj kaj urboj, de la nacioj, de la tuta homaro nepre elkreskos el ĝi. Mi jam aŭdas la demandon: "Ĉu tamen tiuj homoj, la studentoj, ekzemple, havas rilaton al la internacia lingvo? Ĉu tiu lingvo estas necesa kaj utila por ili?" La fakto, ke estas studentaj Esperanto-grupoj, rondoj, societoj k.t.p. pravas, ke al certa kvanto da ili la problemo ne estas fremda. Sed multe da studentoj ne estas bone informitaj kaj ne sufiĉe klare sentas la neceson kaj la utilon de la internacia lingvo. Kaj jen tie estas kampo por granda laboro. Kaj se ni deziras atingi bonajn rezultojn nia informado pri Esperanto, nia strebo allogi la studentaron al uzo kaj defendo de la internacia lingvo devas esti konkreta, sen ia ajn ombro de altrudo. Nuraj bonstilaj prelegoj, sloganoj k.s. estas tute superfluaĵoj, eĉ malutilaj. Jen laŭ mi kion devas fari la bona studento-esperantisto.

Li devas esti antaŭ ĉio homo kun larĝaj kulturaj interesoj, ĉar tio ĝenerale estas utila kia ajn li estu estonte.

Samtempe li devas esti bona specialisto. Pri ambaŭ aferoj Esperanto povas esti netakseble utila. Tamen, por ke li estu vere utila por la ideo de la internacia lingvo li devas obstine, sed inter alio, samkiel oni parolas pri io memkomprenebla kaj tute natura, emfazi la rolon de Esperanto en lia sukceso.

Jen kelkaj ekzemploj. Nia amiko estas studento pri bulgara lingvo, aŭ eble angla, franca filologio. Ne gravas ĉu lia nomo estas Boris, Nenko aŭ Zlatko kaj ĉu ĝi okazas dum 1955 aŭ 1962 jaro. Li vigle korespondas kun siaj alilandaj amikoj en Esperanto pri ilia nacia literaturo — klasika kaj nuntempa. Estas memkompreneble, ke li scias pri multaj aferoj, libroj kaj aŭtoroj, pli ol la ceteraj. Al siaj kolegoj en amika rondo kaj dum oficialaj diskutoj li kundividigas kion li scias pli ol ili. Al la natura demando, de kie li scias tion, li donas simplan, plej koncizan respondon; li montras la leterojn kaj la fotojn de la korespondantoj kaj nerimarkeble, sen bombastaj frazoj kaj brua altrudo, kiel ion plej ordinaran, diskonigas la famon inter liaj samgrupoj kaj samkursanoj, ke jen Zlatko scias la internacian lingvon kaj tiu scio donas al li tiajn kaj aliajn avantaĝojn. Kiam en la universitata ĵurnalo oni deziras aranĝi paĝon pri tiu aŭ alia nacia literaturo, oni konsideros normala kaj simpla afero sin adresi al Boris aŭ Nenko ktp; kaj tiam jam la tuta studentaro komprenos, ke estas ia grupo da studentoj kiuj scias la internacian lingvon. Tio donas al ili nediskuteblan kaj okulfrapan avantaĝon, kaj rilate al la plilarĝigo de ilia ĝenerala kulturo, kaj rilate al la profundigo de iliaj specialaj konoj pri la objekto de ilia studo. Se Boris, Zlatko, Aleksandro, Nenko ktp. agas tiamaniere, tio estos ilia plej bona laboro por Esperanto. Krome ĝi estas farebla sen iaj ajn specialaj streboj. Samtempe tio estos la plej bona utiligo de ilia scio de Esperanto, ĉar ĝi estos senpera apliko en la ĉiutaga vivo, kaj nur tia apliko signifos venkon por Esperanto, ĉar jam ne estos tiel grave diskuti pri ĝia utileco kaj taŭgeco: la problemo estas nur, kiamaniere ni plej bone montru al la publiko tiun utilecon kaj taŭgecon.

Alia ekzemplo: nia amiko estu studento en la Politekniko, lia fako radio-inĝenierio aŭ arkitekturo, lia nomo Dobri aŭ Stojĉo, aŭ Dimitro. La jaro estu 1954, 55 aŭ 56, tio ĉi ne estas tiel grava. En la nacilingvaj ĵurnaloj kaj revuoj pri modernaj konstru-metodoj kaj materialoj, nenio estas skribata, aŭ nur plej etaj sciigoj, ke tie kaj aliloke oni faros tion kaj alion. Sed nia amiko korespondas kun samfakuloj el diversaj landoj kaj pri ĉio li akiras specialajn, detalajn informojn. En Esperanto-revuo li iam vidas etan anonceton pri la nova konstru-materialo "Ytong" kaj baldaŭ en liaj manoj estas tuta broŝuro pri ĝi. Li kundividigas kun siaj amikoj tion kion li scias kaj fine prelegas antaŭ ĉiuj samkursanoj aŭ dum sesio de la studentaj sciencaj rondoj. Eĉ ne unufoje li rekte ion diris por propagandi la internacian lingvon, sed la famo, ke li estas esperantisto kaj ke la scio de Esperanto estas la fundamenta avantaĝo dank' al kiu li scias tion kaj alion, dank'al kiu li faras prelegojn kaj pretigas sian diplomon laboron, jam estas de ĉiuj konata.

Stojĉo estas verkanta sian diplomon eseon; la temo estu, ekzemple, la radiolokado. Li scias, ke tiurilate laboris fama alilanda sciencisto kaj deziras baziĝi sur liaj atingoj kaj eĉ, se eble, ilin profundigi. Li serĉas en la Nacia Biblioteko: nenio estas trovebla. Li pridemandas siajn profesorojn: ankaŭ ili ne konas la detalojn. La sciencisto estas anglo kaj en Anglujo li konas nur unu esperantistinon, kiu tamen estas lingvistino. Sed Stojĉo estas kuraĝa. Li mencias al ŝi la problemon, la aŭtoron

k.t.p. La lingvistino vizitas la Londonan bibliotekon, priparolas la aferon kun koncerna fakulo. Ili trovas la materialon, fotas la paĝojn sur kiuj oni traktas la problemon kaj post du solaj semajnoj Stojĉo per projekcia aparato kaj per la helpo de sia amiko — studento de angla filologio — legas kaj ekscias kion li serĉas. Ĉiuj baldaŭ ekscias pri tiu ĉi unuopa fakto. Ĉu estas necese, ke ni parolu pri la efekto?

Tria ekzemplo: nia amiko estu studento de fiziko aŭ matematiko kaj lia nomo estu Tanko, aŭ Petko, tio ne gravas. Kompreneble, inter liaj alilandaj amikoj nepre estas fizikistoj kaj matematikistoj. Inter ili evidentiĝas eĉ fama specialisto-pedagogo. En nia lando oni diskutas la studprogramon, la problemon pri politeknika edukado kaj pri la rolo de la specialaj fakoj ktp. Nia amiko tute kompreneble interŝanĝas opiniojn tiuteme kun la alilandaj specialistoj kaj, rezulte de tio, en nia revuo "Prosveta" aperas granda artikolo pri la loko de la fiziko kiel lernejfako en la sistemo de la politeknika edukado. La leganta publiko ekscias, ke la opinio de la alilanda fakulo atingis Bulgarujon dank'al Esperanto. Tio ege impresas ankaŭ niajn fakulojn, kiuj ne supozis, ke Esperanto povas esti uzata en la scienca laboro kaj taksis ĝin nur kiel ion amuzan kaj neseriozan.

Foje gastas ĉe Tonko lia franca amiko, studento de matematiko. En la Universitato estas kunvokita kunveno kaj la franco prelegas pri la sistemo de studado en Francujo pri la vivo de la studentoj ktp. Tonko tradukas de Esperanto bulgaren. Temis ja nur pri matematiko kaj pri la vivo de la studentoj. Por Esperanto eĉ ununura speciala vorto ne estis dirita. Tamen ĉiuj bonege komprenis, ke ĉio estas dirata en Esperanto: tio estis pli efika ol ĉiu rekta pledo por Esperanto.

Alia okazo: estas konate, ke la eksterklasa laboro pri matematiko estas la tiel nomata Aĥila malforto en la instruado de matematiko. Temas pri la aranĝo de gajaj matematikaj vesperoj dum kiuj oni rakontas kuriozaĵojn el la vivo de famaj matematikistoj, amuzajn historietojn iel rilatantajn matematikon, ĉiuspecajn taskojn, ofte ne postulantaj specialajn matematikajn konojn sed simple logikon kaj akran cerbon, k.t.p. Materialoj por tia afero tute aŭ preskaŭ tute mankas. Nia amiko sin adresas al matematikistoj-esperantistoj el ĉiuj landoj. Li eĉ publikigas anoncon en Esperanto-revuo. Baldaŭ komencas alveni diversaj taskoj kaj aliaj materialoj. Unue tion eksentas la homoj plej proksimaj: lernantoj kaj kolegoj de la sama lernejo aŭ de la sama fakultato. Sed post la brila organizo kaj aranĝo de unu matematika vespero, jam la tuta urbo, kaj precipe ĉiuj aŭtoritatuloj pri klerigaj aferoj, scias ke tiu aŭ alia scias Esperanton, ke tiel aŭ alimaniere li ĝin utiligas en sia ĉiutaga laboro, kaj ke la rezulto estas la avantaĝoj pri kiuj la homoj bruas. Sekvas artikolo en la faka revuo "Matematiko kaj fiziko", kaj jam la fakuloj en la tuta lando scias, kion povas signifii la kono de la internacia lingvo. Tio nepre influos al ilia sinteno koncerne Esperanton. Ili ĉiam rilatos al ĝi serioze kaj pozitive. Iom pli poste nia amiko faras prelegon pure matematikan antaŭ plenplena salono de fakuloj. En sia prelego, inter la aliaj aferoj, li sufiĉe ofte aŭdigas la vorton Esperanto. Verdire, li nek per unu frazo rekte pledas por Esperanto. Tamen tiel klare evidentiĝis tio kion oni povas atingi pere de Esperanto, ke estas superflue paroli rekte pri la racia konkludo, al kiu ĉiu tute nature alvenis....

Mi povus klarigi al vi kiel, dank'al senbrua laboro de alia amiko, aperis serio da artikoloj en nia stenografia revuo; kiel en la naturscienca revuo "Naturo kaj scienco" aperis kaj aperas artikoloj tradukitaj de Esperanto, ktp ktp. Se en iu direkto ni ankoraŭ ne atingis notindajn sukcesojn, niaj fakuloj devas preni al si bonan noton.

Ŝajnas al mi, ke la dirita estas jam sufiĉa, por ke ni eltiru niajn konkludojn. Kiaj ili estas? Mi deziras esti konciza. Se ni sukcesos trovi manieron por ĉiutage praktike apliki en nia laboro la internacian lingvon, neniurigardos al ni kiel al iaj stranguloj, neniurilatos malse-

rioze al Esperanto kaj primokos ĝin. Nur tiamaniere ni gajnos la vastan publikan opinion por Esperanto. Nur tiamaniere ankaŭ la fakuloj kaj la specialistoj ne nur subtenos nin sed eĉ fariĝos aktivaj esperantistoj.

Tamen ĉio ĉi supozas, ke antaŭ ĉio ni estu homoj kun larĝaj kulturaj intereso, homoj kun rekonata faka lerteco kaj kapablo. Do, ni laboru ĉiutage sur ni mem, por ke ni iĝu tiaj. Nia juneco estas garantio por nia sukceso.

Petko Arnaudov

* M. D. Kammari: "Konstruado de komunismo kaj plua proksimiĝo de la nacioj en USSR" p. 41, Revuo "Problemoj de la filozofio" n. 9a, j. 1961.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1962

Stato je la 31-a de oktobro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	3610	4085	113,16
2.	Francujo	6754	7170	106,16
3.	Nederlando	4942	5038	101,94
4.	Danlando	2876	2906	101,04
5.	Germanujo	7085	7146	100,86
6.	Norvegujo	1677	1650	98,39
7.	Svislando	2103	2055	97,72
8.	Italujo	4253	4150	97,58
9.	Hispanujo	2557	2490	97,38
10.	Japanujo	3265	3170	97,09
11.	Britujo	6661	6353	95,38
12.	Finnlando	2525	2385	94,46
13.	Brazilo	4142	3676	88,75
14.	Svedujo	6190	5375	86,83
15.	Belgujo	2006	1680	83,75
16.	Jugoslavio	5560	1670	30,04

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	505	895	177,23
2.	Aŭstralio	1148	1223	106,53
3.	Israelo	285	300	105,26
4.	Kanado	746	759	101,74
5.	Aŭstrujo	1440	1465	101,73
6.	Nov-Zelando	1184	1172	98,99
7.	Portugalujo	515	495	96,12
8.	Madagaskaro	250	232	92,80
9.	Islando	250	215	86,—
10.	Sudafriko	250	195	78,—
11.	Urugvajo	250	155	62,—

ARTISTOJ KAJ FOTOARTISTOJ!

La redakcio de "MONDA KULTURO" deziras aperigi ankaŭ artajn kaj kulturajn fotojn faritajn de la esperantistoj, kaj tiucele invitas la kunlaboradon de niaj fotoartistoj.

Ankaŭ fotojn pri artverkoj de esperantistaj verkistoj ĝi deziras ricevi, por ke la nova kultura revuo prezentu tiujn facetojn de nia kulturo.

Oni sendu siajn fotojn al la Redakcio de "Monda Kulturo", 35 Deerpark, Sauchie, ALLOA, Clacks., Skotlando.

ESPERANTO-INSTRUADO AL GEPACIENTOJ

La Nederlanda Ruĝa Kruco havas belegan kaj tre praktike instalitan hospital-ŝipon nomitan laŭ la fondinto de la Ruĝa Kruco: "J. Henry Dunant". Ĝi enhavas 70 litojn kaj do povas komforte kuŝigi 70 gepacientojn kaj do povas servi ĉe katastrofoj kiel flosanta malsanulejo. Feliĉe ĝi ĝis nun ne estis uzata por tiu celo, sed jam 4 somerojn por ĝuigi ĉiam hejme kuŝantajn gemalsanulojn per tutsemajna ŝipekskurso tra tuta Nederlando, ĉiusemajne por alia sepdeko.

Mi kiel enlita kriplulo jam dufoje partoprenis tian ŝipekskurson por frisaj gepacientoj kun grandega plezuro. Ni veturis de Leeuwarden unufoje tra Amsterdamo, Haarlem al Utrecht kaj revene, alifoje tra Zwolle, Arnhem, Utrecht, Amsterdamo hejmen, ĉiuvespere akceptante gevizitantojn en la lokoj, kie la ŝipo haltis por tranoktado.

La ŝipo havas ŝipradion, antaŭ kies mikrofono mi babilis pri miaj agrablaj spertoj per Esperanto kaj tiel iom propagandis por la Internacia lingvo.

La gepacientoj hejme ricevas ĉiuduamonte 16-paĝan organeton "ONS TREFPUNT", kontaktgazeton de la Ned. Ruĝa Kruco por hejme kuŝantaj aŭ sidantaj gepacientoj. Ankaŭ en ĝi mi skribis pri Esperanto kaj proponis gvidi skriban kurson por ties gelegantoj, kiuj povus ĝui internacian kontakton per korespondado kaj interŝanĝado de p.-m. kaj aliaj kolektataj objektoj. La kurso ne povis okazi en la gazeteto mem, kiu ampleksas nur 16 paĝojn kaj aperas nur ĉiuduamonte, sed kiam anoncis sin 25 geinteresatoj, la redakcio kaj mi decidis, ke mi dissendigu lecionleterojn al la gekursanoj kaj ĉiudumonte raportu pri la kurso en la gazeteto. Pro tiuj raportoj kaj novaj instigoj ĉiam venas novaj gelernantoj: jam anoncis sin 52, kuŝantaj aŭ sidantaj dise tra la tuta lando. La unuaj 25 ricevas la lecionleterojn senpage, kion ebligis kolektita sumo. La ceteraj pagis mem 3,— ned. guld. por la nete presitaj 20 lecionleteroj. Por ĉiuj la korektado estas senpaga. La gekursanoj pagas nur la afrankojn por sendi kaj ricevi la ekzercojn. Do la kondiĉoj estas tre favoraj.

La gekursanoj povas mem decidi pri la studorapideco laŭ cirkonstancoj. Kelkaj preskaŭ atingis la finon de la kurso, aliaj ankoraŭ estas komencontaj aŭ duonvoje.

Kiuj atingis la 15-an lecionon, ricevas de mi adresojn de eksterlandaj gekursgvidantoj aŭ gesamideanoj, kiuj povas kaj bonvolas ebligi la unuan internacian kontakton. La unua karto aŭ letero kun kolektotaj poŝtmarkoj el la eksterlando ĝojigas kaj entuziasmigas miajn gekursanojn, kiuj tuj sendas al mi siajn unuajn eksterlandajn korespondaĵojn, demandante la signifon de eventuale nekomprenitan vorton aŭ frazon, kiun mi volonte tradukas aŭ klarigas.

Multaj homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, ne ekstudas ĝin pro okupiteco. Multaj gepacientoj volonte akceptas la eblon studi Esperanton: ili ja havas tempon por la studo, kiu samtempe estas por ili distro kaj pliklerigo.

Mi skribas pri ĉi tiu kurso por instigi eksterlandajn gesamideanojn imiti ĉi tiun ekzempon: oni ja povas samtempe distri, plezurigi kaj pliklerigi personojn, kiuj alie enuus kaj perdus la kuraĝon plu vivi, kaj propagandi Esperanton. Ne nur la gekursanoj ekscias pri kaj ĝojas per Esperanto, sed ankaŭ iliaj gesamhejmanoj, geamikoj kaj ofte la kuracistoj, kiuj konstatas la plezuron, kiun donas la Esperanto-studo al iliaj gepacientoj.

Kelkfoje samhejman(in)o kunstudas Esperanton kun kursan(in)o por eventuale helpi kaj mem ĝui kaj pliklerigi.

Gepacientoj kaj gekripluloj eksterlandaj, kiuj scias Esperanton kaj ŝatus korespondi aŭ interŝanĝi kolektind-

LA LABORPLANO DE U.E.A. JE KLUBA NIVelo

Nur kiam ni esperantistoj fariĝas aktivaj kaj ne hezitas pri laboro, ni povas antaŭvidi rezultojn de nia penado. Komprenante tion, niaj lokaj societoj jam nun havas eksterordinarajn eblecojn, kiam ili estas pretaj agadi laŭ difinita plano. Ni esperantistoj disponas pri la senkompare plej efika rimedo por internacia, interhoma kunlaboro larĝbaze: nia Esperanto.

La nova laborplano de UEA sugestas al la landaj asocioj kaj lokaj societoj ellabori proprajn laborplanojn surbaze de la ĝeneralaj rekomendoj de UEA. Jam nun ni rimarkas novan aktivecon en diversaj landoj, kie la esperantistoj bone komprenis la proponojn kaj eklaboris laŭ ili. Kompreneble estas necese unue tre atente esplori la eblecojn kaj laŭ la cirkonstancoj en la koncernaj landoj elekti plej konvenajn vojojn. Ne ĉio estas realigebla rekte kaj senŝanĝe ĉie. La laborplano de UEA tamen enhavas tiom da ideoj kaj efektivaj proponoj, ke oni ĉie en la mondo povas elpreni el la baza plano kelkajn partojn, kiuj post alĝustigo al la enlandaj kutimoj kaj eblecoj estas taŭgaj.

En Svedlando ekzistas proksimume kvindek lokaj societoj esperantistaj. Inter ili kelkaj troviĝas en la distrikto Skaraborgo, la regiono inter la du grandaj lagoj Venern kaj Vettern. La distrikta organizaĵo, kiu estas speciala organo de kunlaboro inter distrikta UEA-klubo, ellaboris kompletigan planon al tiu de UEA kaj estas nun preta eklabori laŭ la principoj de tiu plano.

Tiu ĉi numero enhavas anoncon, kiu estas alvoko al kluboj kaj grupoj esperantistaj ĉie en la mondo kontakti unue skribe kun la distrikta organizaĵo en Skaraborgo. Oni celas konstantan kunlaboron por interŝanĝi praktikajn servojn. Gravega estas la kultura interŝanĝo baze de Esperanto. En la klubaj konstelacioj (grupoj de kunlaborantaj, diversnaciaj kluboj kaj societoj esperantistaj) tutcerte povas evolui fruktodona agado, kiu donos utilon kaj al la unuopaj membroj kaj al la movado. Konstanta interŝanĝado de bonkvalitaj prelegoj pri diversaj temoj, gazetartikoloj, filmoj, sonbendoj, literaturo, muziko ktp. povas doni instruon kaj distron al la membroj de la kunagantaj kluboj. Reciprokaj vizitoj de grupoj kaj individuaj esperantistoj povas profundigi kaj fortigi la interligon.

La UEA-klubo en la regiono de distrikto Skaraborgo malfermas per sia aktiveco novan pordon kaj invitas societojn esperantistajn en aliaj landoj al amika kunlaborado. La programo de niaj samideanoj en Skaraborgo ankaŭ celas doni loko kaj enlande bonan reputacion al nia movado, montrante ke ni racie laboras por eluzi Esperanton sur praktika bazo. Ni varme rekomendas al vi senprokraste skribi, petante detalajn informojn de Distrikto Esperantista de Skaraborgo, kies adreso estas: Lottkällsgatan 2, LIDKÖPING (Svedlando).

aĵojn kun samsortan(in)o nederlanda, povas sendi bildkarton kun saluto kaj sia adreso al kursan(in)o mia tra mia adreso.

Gekursgvidantoj, kiuj havas korespondemajn aŭ interŝanĝemajn gelernantojn, povas instigi ilin fari la samon.

Mi mem ŝatus ricevi informojn pri eventuala(j) organizo(j) de esperantistaj gekripluloj.

S. S. DE JONG Dzn,
"O.T."-Esperanto-kursgvidanto,
Waltaweg 3,
TJERKWERD (Fr), Nederlando

KION INICIATIS VI EN LA KADRO DE LA DUA LABORPLANO DE UEA?

Kongreso

Tra horoj ŝvitigaj de varma somero
Abeloj deĵoras senĉese;
Nektara parfum' drivas tra la aero,
Tiklante flarilojn karese.
Celtrafe flugante de floro al floro,
Sub gvid' deodoro — kaj eble koloro,
Garnante sin per la miela trezoro —
Abeloj misias sukcese.

Sed duan funkcion abeloj plenumas,
Krom fari provizon sukeran:
Ĉar dum ili tien kaj ĉi tien zumas,
Spitante kapricon veteran,
La saĝaj bestetoj kontaktas stamenojn,
Kaj portas de floro al floro polenojn,
Do tiel certigas estontajn festenojn —
Kaj vivon por si aglomeran.

Nu kiel, vi petas, rilatas abeloj
Al esperantista kongreso?
Aŭskultu do, vi geportantoj de steloj,
Kaj venos al vi intereso!
Ni estas abelaj en nia agado, —
Jar' estas la tago de mielgajnado, —
Kongreso, por ni, perioda parado —
Taksado de nia progreso.

Sed en abelujo de nia kunsido —
En urbo kongresa de l'jaro,
Okupas nin, krom nia meritdivido,
Aferoj de grava bonfaro.
Malnovaj amikoj denove salutas,
Pri faka planado ni vigle diskutas,
Kaj ĉiuj sin distras (eĉ ame balbutas!) —
Kulmino de la kalendaro!

AVOTO

Sept. 1962

RICEVITAJ LIBROJ

FLORAS, FLAMAS EN SKARLAT'. Kompilis Redakcio de "La Movado". Eld. Kansai Ligo de Esperanto-grupoj, Japanujo, 1962. 48p. 25.5 × 17.7 cm. Kantlibro kun muziknotoj.

Bep M. Slösser-Bresler: ERNA (Kion Erna travivis en Pinurbo). Rakonto por junaj naturamantaj infanoj. Eld. I.K.U.E., Dordrecht, Nederlando, 1962. 52 p. 20.9 × 16.3 cm. Prezo: 1.50 gld. (6 steloj).

Delfí Dalmau: ACLARIMENTS LINGÜISTICS. Serio Panorama Actual de les Idees. Eld. Rafael Dalmau, Barcelona, 1962. 64p. 18.2 × 13.5 cm. Katalunlingva.

Gerald K. Hibbert: LA ESENCO DE LA KVAKERISMO. El la angla trad. Marek Wajsblum. Eld. Kvakera Esperantista Societo, 1962. 40p. 17.2 × 11.2 cm.

Francisco Cândido Xavier: KRISTANA AGENDO. Trad. A. K. Afonso Costa. Eld. Federação E. Brasileira, Rio de Janeiro, 1962. 102p. 18.5 × 12.5 cm.

NEELMEZUREBLA NI LAŬDEGAS VIN. Preĝoj por ĉiuj kristanoj en la spirito de la Ĥrisostomo-liturgio kaj de Nenomitaj. Eld. Thomas-eldonejo, Zurich, 8a eldono, 1962. 32p. 15.2 × 9.3 cm. Prezo: 1.65 gld. (6.6 steloj).

D-ro Zamenhof-Parko

Okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝtago de la en 1917-a mortinta pola okulkuracisto d-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, la Internacia lingvo, la urbo LJOUWERT (LEEWARDEN) en Frislando, Nederlando, nomis unu el la parkoj "D-ro Zamenhof-park" laŭ kaj honore al li.

La arbar, kreskajoplana,
riĉa je odor', kolor',
trairebla nur kun peno,
lacigemas por la kor'.

Kulturisto fakosperta
hakas troaĵaron for
kaj ordigas, ja tre lerta:
ĉio plaĉas pli al kor'.

La arbar' netrairebla
havas vojojn kun branĉ-ark'
kaj beleco admirebla,
iĝis ordigita park'.

En la kruda lingv-arbaro,
admirebla en si mem,
ĝenas homojn bar' post baro:
malaperas promenem'.

Zamenhof, lingv-kulturisto,
zorgis pri irebla voj'.
El naturo raciisto
kreis parkon kun vivĝoj'.

El arbaro ja senvoja
per hakado, tranĉ' kaj sark'
iĝis por la hom' tre ĝoja.....
bela, tra-irebla park'.

Homoj el tre multaj landoj
nun rilatas kor' al kor';
ligas amikec-rubandoj.
Zamenhof, al vi honor'!!

Verkis en la frisa lingvo 15-12-1959-a: S. S. de JONG Dzn.
Tradukis en Esperanton 24-7-1962-a la verkinto mem.

Kling-Klang: LATENTAJ NOMBROFENOMENOJ EN LA SANKTA SKRIBO I. Eld. Nova Mondo, Stokholmo, 1962. 16p. 21 × 14.8 cm. Prezo: 1.60 gld. (6.4 steloj).

Ole Nederland: TOM KAJ TINA EN LA FLUGMAŜINO. Internacia lernolibro por infanoj, 2. Eld. Dansk Esperantoforlag, 1962. 71p. 23 × 15.5 cm. Prezo: 4.25 gld. (17 steloj).

ESPERANTO INTERNACIA LINGVO POR SKOLTOJ. Eld. Eŭrosel, Nederlando, 1962. Ĝis nun tri partoj, multobligitaj, resp. 10, 8, 16 p. 21.5 × 16.5 cm. Kun ŝlosilo laŭ nacieco. Prezo por 6 partoj: 2 gld. (8 steloj).

AVOTO PRAVAS! EN SOFIO ATENDAS VIN MIRINDA 48-a!

La Sofia nacia Operteatro

La nacia operteatro de Popola Respubliko Bulgarujo jam havas pli ol duonjarcentan ekzistadon. Sur la fono de la historia evoluo de la operarto, tio ne estas granda periodo, sed por iu juna muzika kulturo, kiu ankoraŭ ne havas jarcenton de sendependa kaj memstara vivo, duonjarcento signifas riĉan sperton kaj valorajn tradiciojn.

Jam en la fino de la pasinta jarcento grupo da entuziasmoj komencis la provojn krei konstantan operteatron en Sofio. Sed la regulaj spektakloj komenciĝis en la unuaj jaroj de la nuna jarcento. Sed apenaŭ post kiam forpasis la Unua mondmilito la ŝtato decidis akcepti la operejon kiel entute subvenciitan institucion. En la jaroj 1920-1940 la Sofia nacia operejo (tiam ununura en la lando) amasigas grandan repertuaron kaj funkcias ĝenerale laŭ la vojo de realisma arto. Pri tio kunhelpas la tradicio de la rusa operkulturo, kiu montras fortan bonefikan influon al nia operteatro jam de la unuaj tagoj de ĝia ekzistado ĝis nun. Alia forta kaj krea influo al la bulgara arto estas tiu de la itala operteatro.

Nun en la malgranda Bulgarujo estas 5 ŝtataj operteatroj, kiuj proporcie al la loĝantaro, estas multe pli ol en multaj aliaj progresintaj landoj. La ŝtato konstruis speciale por la Sofia nacia opero belegan kaj oportunan konstruaĵon, kun 1,300 sidlokoj kaj ĉiuj nuntempaj teknikaj komfortaĵoj. Nun la Sofia operteatro okazigas ĉiusemajne 8-10 spektaklojn, kio kune kun tiuj de la aliaj operteatroj ekster la ĉefurbo, parolas pri la plialtigita kultura nivelo de la publiko. Oni aranĝas specialajn spektaklojn je malplialtaj prezoj por lernantoj, studantoj kaj soldatoj, grupaj vizitadoj por laboristoj k.t.p. La opera kolektivo ofte gastas ankaŭ al diversaj provincaj urboj, kiuj ne havas siajn operteatrojn. "Pli daŭre inter la popolo!" — tio estas la alvoko, kiu impulsigas la operagantojn.

Sur la scenejo de la Sofia nacia operejo oni ludas preskaŭ ĉiujn verkojn de la tutmonda operklasiko, komencante de Gluk kaj Mocart, poste sekvante al Bizet, Verdi, Musorgski, Ĉajkovski kaj atingante al Puĉini. En la lastaj jaroj oni prezentas ĉiam pli ankaŭ nuntempajn operajn komponistojn, kiel Prokofiev, Ŝebalin, Volf-Ferari Bartok, De Fajja, Kabalevski, Haĉaturjan, k.a. Ĉiam pli kaj pli oni prizorgas ankaŭ pri la bulgara operverkado, kiu jam havas siajn elstarajn aŭtorojn kaj verkojn, iuj el kiuj ĝuas sukceson ne nur en sia patro-

lando, sed ankaŭ eksterlande. Tio estas verkoj de L. Pipkov, V. Stojanov, Al. Rajĉev, M. Goleminov, P. Haĝiev k.a.

La baleta kolektivo ĉe la Sofia nacia operteatro estas ankaŭ unuaranga konsisto, kiu plenumas je alta arteca nivelo plej malfacilajn verkojn de la baletarto, kiel: "Cigna lago" kaj "La dormanta belulino" de Ĉajkovski, „La ligna princo" de Bartok, „Jizel" de Adam, „Gajane" de Haĉaturjan k.a.

Delonge Bulgarujo famiĝis kiel lando de la belaj kantoj kaj la ĉarmaj voĉoj. Jam antaŭ 40 jaroj kantistoj kiel Petr Rajĉev, Hristina Morfova, Anna Todoreva k.a. kolektis sukcesojn sur ĉiuj eŭropaj operscenejoj. Hodiaŭ tiu gloro kvazaŭ atingas sian apogeon en la persono de la famaj bulgaraj operkantistoj Boris Ĥristov, Elena Nikolaj, Dimitr Uzunov, Nikolaj Gjaurov, Katja Popova, Nikola Nikolov, Rajna Kabaivanska, Ljubomir Bodurov kaj multaj aliaj, kiuj estas ĉiamaj kaj serĉataj gastoj sur la plej grandaj operscenejoj en Milano, New York, Londono, Vieno, Berlino, Parizo, Moskvo, Prago, Bruselo k.a. En la Sofia nacia operejo laboras ankaŭ unuarangaj orkestro-direktantoj, kiel Asen Najdenov kaj voĉaj pedagogoj, kiel Ĥristo Brambarov, kiuj same meritinde ĝuas vastan internacian popularecon. Sed sur la sofia opercenejo vi povas aŭdi ne nur bulgarajn interpretistojn. Kaj en la pasinteco kaj nun tie ĉi tre ofte gastis kaj gastas operartistoj kaj direktantoj el famaj operteatroj en la mondo, komencante de Ŝaljapin kaj Tito Skipa, kaj atingante al multaj nuntempaj eminentuloj.

Nun en Bulgarujo estas kreitaj ĉiuj kondiĉoj por plena disfloriĝo de la operkulturo. La bulgara operteatro interŝanĝas riĉan sperton kun multaj operteatroj. La operkulturo enpenetras ĉiam pli vaste en la popolamasojn kaj la internacia rekono de la bulgaraj operagantoj fariĝas pli kaj pli granda. Jen pro kio la registaro decidis organizi en Sofio ĉiun duan jaron internacian konkurson por junaj operkantistoj. La unuan tian konkurson oni organizis grandsukcese en 1961 kun proksimume 100 partoprenantoj el pli ol 50 landoj. Je la konkluda rondplenumo de la konkurso la elektitaj de larĝa internacia ĵurio kantistoj plenumis la ĉefrolon en unu spektaklo de la opero.

Nacia Respubliko Bulgarujo jam ĝuas la renomon de tutmonda operforto.

Tradukis Iv. N. Draganov

GENERALA ALVOKO

Gesamideanoj en la tuta mondo estas alvokataj kaj invitataj estiĝi celsciaj Pioniroj de la Tutmonda Esperanto-Movado.

Estas necese, ke

1. ĉiu esperantista gazeto malfermu rubrikon, en kiu oni priskribos diversajn metodojn kaj problemojn de Esperanto-propagando,
2. ĉiu esperantista organizaĵo aŭ asocio tutŝtata aŭ tutlanda, regiona kaj alia fondu sekcion, kies tasko estos okupi sin pri disvastigado de Esperanto en kadro de ĝia agadsfero,
3. ĉe ĉiu klubo de esperantistoj fondi Rondeto de Esperanto-Pioniroj.

La tasko de ĉiu el ili estu: libervole devigi sin sendi ĉiutage kiel "presaĵon" je propra kosto almenaŭ al unu persono, kiun la Esperanto-Pioniro supozas varbinda por nia movado, informan flugfoliojn, kiu mia opinie povus enhavi sekvantajn ĉapitrojn:

- a. eldiroj de fame konataj personoj pri neceso kaj utileco de internacia lingvo kaj speciale pri Esperanto,
- b. priskribo de la deveno de Esperanto, de ĝia movado, internaciaj kongresoj, de ĝia uzado, literaturo ktp.
- c. gramatiko de Esperanto,
- ĉ. Esperanta teksto en formo de letero proponanta amikan interŝanĝon de leteroj, poŝtmarkoj, gazetoj ktp.,
- d. adreso, al kiu interesuloj pri lerno de Esperanto sin turnu kaj petu informojn pri persona aŭ perletera instruado aŭ aliaj informoj.

Tiajn informajn flugfoliojn povus eldoni la Rondetoj de Esperanto-Pioniroj aŭ la sub 1 kaj 2 nomataj organizaĵoj en sufiĉe granda kvanto. La Rondetoj de Esperanto-Pioniroj devus per antaŭaj mendoj kontribui al atingo de malalta prezo de la informaj flugfolioj. Ĉiuj aliaj ĉi-temaj libervolaj sindevigoj estas varme dezirataj.

A. V. Zedník

35a SAT-KONGRESO

En la Revuo de oktobro 1962 / 181 vi raportis pri la 35-a S.A.T. kongreso en Vieno kaj skribis i.a.:

"La junularo... postkongrese kunstadis unu semajnon en Naturamika ŝirmejo en la fama Viena Arbaro."

Tio estas malĝusta. Fakte la Junularo renkontiĝis postkongrese en T e r n i t z, industria urbo, 70 kilometrojn sude de Vieno. Dum tiu semajno la gejunuloj el sep landoj ankaŭ ekskursis sur Neĝmonton (pli ol 2000 m) kaj vizitis la faman ŝtaluzinon "Schöller-Bleckmann" en TERNITZ.

Kitty Kuttelwascher

BRAZILIO - BRAZILIO

De kiam la Akademio de Esperanto ne aprobis, sed ankaŭ ne malaprobis la enkondukon de la sufikso i, por indiki landnomojn, niaj verkistoj — la rajtigataj farantoj de la lingvo — dividiĝis en la grupoj de tiuj, kiuj ĝoje akceptis la neologismon, kaj en la grupo de tiuj, kiuj insiste malkonsilas ĝin. La vivanteco de Esperanto postulas, ke ni lasu la finan vorton al la ĝenerala uzado.

Tamen rilate al du landnomoj — Meksikio kaj Alĝerio — ĉiuj senescepte uzas la sufikson pro tio, ke nacilingve la du landoj kaj la koncernaj ĉefurboj portas la samajn nomojn: Mexico kaj Algiers. La solvo estis sendube tre interesa, ĉar ĝi ankaŭ simpligis la vortfaradon: meksika-meksikia, meksikano-meksikiano, alĝera-alĝeria, alĝerano-alĝeriano.

Lastatempe demando iom simila al ĉi tiu stariĝis, rezulte de la eksterordinara kaj rekorde rapida konstruo de nova ĉefurbo por mia lando, sur tute neloĝata kampara ebenaĵo, en la geometria centro de la teritorio, al kiu la registaro donis la portugallingvan nomon Brasília. Bonvolu rimarki, ke tiu nomo konvenus pli ĝuste al la lando, ĉar ĝi etimologie respondas al Brazilando. Okazas, ke de pli ol kvar jarcentoj ni jam nomas nian patrujon Brasil; interŝanĝo de la du nomoj estus nun tute neebila.

Tamen nacia tradicio ne trude influas sur la Esperantan vortaron, kaj mi opinias, ke, kvankam la nomoj Brasil kaj Brasília ne estas ja egalaj, la konsilinda solvo estas ĝuste tiu, kiu tiel bone konvenis al Meksikio kaj Alĝerio. Do ni diru: Brazilo estas la ĉefurbo de Brazilio.

Mi faras tiun proponon al la tutmonda esperantistaro, ĉar mi kalkulas pri la helpo de la eksterlandaj samideanoj, por ke oni ne senbezzone komplikigu la aferon. Kiel sciante, la enlandanoj konsideras tro multe da akcesoraĵoj rilate al la nacilingvaj geografiaj nomoj, kaj forgesas la malfacilan batalon de Esperanto por la asimilado de tiuj nomoj.

G. P.

ESPERANTO EN IZRAELO

En "Esperanto", N-ro 681 (9), paĝo 153 (Informado) enestis eraro, nome s-ro Suckever ne estis prezidanto, sed vicprezidanto de Esperanto-Ligo en Izraelo. Prezidanto estas s-ro mag. Isaj Dratwer. S-ino Suckever forveturis Afrikon, kie, ni esperas, li ankaŭ propagandos Esperanton. Kiel vicprezidanto de Esperanto-Ligo en Izraelo nun estas elektita s-ro d-ro Jakub Beĥar. Bonvolu afabla korekti la eraron.

Samtempe ni informas, ke la Urbestraro de urbo Bat Jam laŭ la propono de la Centra Komitato de ELI, dum kunsido de 6.8.62 decidis nomi unu el la stratoj laŭ Zamenhof.

Nun en Izraelo ekzistas Zamenhofaj stratoj en: Tel Aviv, Jerusalemo, Haifa, Holono. Kfar Saba, Herzlia, Kirjat Bjalistoko, Kfar Ata.

J. Giladi

Mag. I. Dratwer

SAVU NIAJN LIBROJN

En la oktobra numero de la revuo "Esperanto" aperis artikolo titolita "Savu niajn librojn".

Kiel sekretario de la Esperanto Rondo en la Universitato de Amsterdam, mi ŝatus aldoni al ĝi ion pri la situacio ĉi tie.

Ankaŭ la amsterdama Universitata Biblioteko ricevis testamente sufiĉe grandan nombron da esperantaj libroj. Tiuj do, kun poste donacitaj kaj aĉetitaj verkoj, formas iuspecan Esperantofakon de tiu biblioteko.

Komprenoble laŭ la karaktero de universitata biblioteko, ili estas ĉefe je dispono de la studentoj. Tamen laŭ la koncerna regularo, bibliotekon kaj legejon rajtas uzi ĉiuj personoj havantaj pli ol 18 jarojn. Prunti el la biblioteko (t.e. kunpreni hejmen, ĉar ĉiuj rajtas kunpreni librojn al la legejoj) rajtas studentoj amsterdamaj kaj "aliaj personoj, kiuj bezonas sciencajn verkojn por studaj celoj". Ankaŭ estas rajtigataj al pruntado tiuj, kiuj bezonas la librojn por sia profesio, ekz. ĵurnalistoj kaj verkistoj.

Se oni scias, ke por tiuj ĉi kategorioj ankaŭ perpoŝta pruntado estas ebla, oni povas konstati, ke la libroj testamentitaj al la amsterdama Universitata Biblioteko certe ne estas perditaj por la ĝenerala publiko.

Mi esprimas la esperon, ke la subfrazo "tiujn librojn, kiujn la Asocio jam havas, ĝi disponigos al aliaj esperantistoj" indikas iun estontan bibliotekan agadon, kaj ne donacadon de la ricevitaj libroj al privatuloj — ĉar tiukaze la danĝero de "perdiĝo" ne fariĝus malpli granda.

W. F. Pilger

(Noto de la Redaktoro: Mi ĝojas, ke en Amsterdamo la situacio estas tiel kontentiga. En St. Andrews Universitato, Skotlando, la afero estas alia. Mi sukcesis konsulti la esperantajn librojn tie nur post longa insistado ĉe la bibliotekisto, kaj eĉ tiam nur surbaze de tio, ke mi tiam estis studento en alia skota universitato. Farante tiun escepton, la bibliotekisto dekretis, ke deĵoranto de la biblioteko devas ĉeesti la tutan tempon de mia konsultado, kaj tio efektive okazis: kompatinda junulino sidis kaj observis min dum mia trihora esplorado de la bretoj kaj legado en multaj volumoj!)

Tra la Mondo

Argentino

● **Sub titolo "Ĉu ekzistas universala mono?"** la vesperjurnalo "El Litoral" en Santa Fé (15an de aŭgusto 1962) aperigis longan leteron de Hugo J. Ceretti pri la Steloj de Universala Ligo, kun foto de la moneroj.

Belgujo

● **Vastskalan eksperimenton** oni nun organizas en Bruselo en kunligo kun kurso por la mezgradaj instruistoj. Speciale studitan cirkuleron oni sendos al pli ol mil francilingvaj instruistoj. La kurson gvidos s-ro G. C. Figuera.

Britujo

● **Konata kultureldonejo MacLellan (Glasgovo)** eldonos serion de dulingvaj verkoj, en kiu unu el la lingvoj estos Esperanto. Unuflanke estos libroj en Esperanto kun anglalingva traduko, kaj aliflanke estos libroj verkitaj en angla aŭ skota lingvo kun esperanta traduko. La serion redaktas William Auld. La unua volumo, kiu aperos en la fino de 1962 aŭ frue en 1963, estos "Ahasvero de amo" de K. Kalocsay, kun verstraduko en la angla de Marjorie Boulton kaj enkonduko de William Auld. La dua volumo estas preparata.

Cejlono

● **Fine de septembro dek personoj** ĉeestis fandan kunvenon de **Cejlona Esperanto-Societo**, kiu akceptis statuton kaj 15-punktan laborplanon. Sekretariino estas F-ino Suloĉna Raĝaratnam, 22 Canal Lane, COLOMBO 6, Cejlono. Urĝe bezonataj por stimuli la novan societanaron estas ĉiaj presaj, precipe gazetoj. Per tiu fondo kulminis trimonata laboro, dum kiu D-ro Victor Sadler faris 12 prelegojn al entute mil personoj. Krome okazis radiointervjuo kaj prelego, kaj aperis en Cejlona gazetaro minimume 11 informoj kaj 2 artikoloj. 50 personoj eklernis la lingvon, plejparte gejunuloj. Esperanta-sinhala vortareto estas nun presata de la Universitato de Cejlono en 2000 ekzempleroj. Jam aperis dum septembro en 500 ekzempleroj multobligite 14-paĝa "Budhisma Terminaro", eldonita de Budhana Eldona Societo en Kando. En preparo estas kolekto de sinhalaj rakontoj, reverkataj de D-ro C. H. Dharmatilaka.

Danlando

● **La internaciaj aŭtunferiaj Esperanto-kursoj** en la sporta altlernejo de Vejle ankaŭ ĉi-jare havis grandan sukceson. Unu el la kvin kursoj estas speciale menciinda: "Esperanto laŭ naturmetodo" (eld. Dansk Esp-Forlag, Aabyhøj). La instruo estis nur per Esperanto sub gvidado de s-ro Sogaard-Hansen. Interalie oni vizitis cigarfabrikon de P. Pedersen, kiu estas fervora esperantisto kaj baptis la cigarojn "Esperanto". Ĉiutage eliras el la fabriko pli ol 150 mil cigaroj kun

tiu nomo. Dum la vesperoj i.a. prelegis s-ro F. Faulhaber, Amsterdamo. Ĉeestis la kurson ankaŭ 18 infanoj, kaj pluraj blindaj esperantistoj.

Francujo

● **"Muelejoj de Metilernantoj"**, granda franca junulorganizo, havas pavilonojn dediĉitajn al diverslandaj junularoj. Unu el ili, en Piot, estas Esperanto-pavilono. S-ro Chareille, la kreanto de la movado, estas tute favora al Esperanto, kaj multe deziras, ke Esperanto disvastiĝu en la Muelejoj. Tial estas tre dezirinde, ke multaj junaj esperantistoj vizitu la Muelejojn. La Esperanto-pavilono ricevas tre favoran mencion en la franca gazetaro.



Esperanto-pavilono en Piot

- **La komitato de U.E.F.** kunvenos la 9an de decembro en Parizo.
- **En Tourcoing, la kongreso de franc-germanaj asocioj** organizis debaton kun ĉeesto de U.E.A. delegito.
- **La gazeto "Le Courrier de Valenciennes"** afable disponigis siajn monstrofenestrojn por la ekspozicio de la loka klubo.
- **Unua kandidato** por posteno de respublika prezidanto estis Sro J. Pignero, aŭtoro de alvoko "Halto al la atomismo".
- Pro la jarfinaj festoj, **la nederlanda ambasadejo** donacis al ĉiu esperantisto, kiu petis tion la libreton "Sankta Nikolao en Nederlando".
- **Ĉu la gazeto "T.C." regule informos pri esperanto**, post unua anonco rilate la kongreson de I.K.U.E.? Legantoj afable instigu la redakcion: "Témoignage Chrétien", 49 Rue du Fg. Poissonnière, Paris 9.
- **Unuafoje, la Pola Radio** prezentis la dramon de Charles Vildrac "Ŝipego Tenacity", en la E-traduko de R. Bernard.
- **En Amiens, sesdek geesperantistoj** el Norda Francujo aŭskultis la paroladojn de Sroj R. Llech-Walter, prezidanto, kaj P. Petit, vic-prezidanto de U.E.F.
- **Internacia Kultura Semajno 1963.** Sub la aŭspicioj de la Franca Ministerio pri Edukado, de la 1-a de aprilo ĝis la 7a en Kastelo Grésillon, Baugé

(Maine-&-Loire), Francujo, okazos Internacia Kultura Semajno kun la partopreno de eminentaj esperantistoj. Interalie oni pritraktos dum tiu semajno la temojn de la Internacia Konferenco de Lernejoj instruantaj Esperanton, kaj la Forumo de la Popolaj Universitatoj. Informojn donos s-ro Micard, instruisto, Epineux le Seguin, Mayenne, Francujo.

● **Ora Jubileo.** La grupo "Bona Stelo", 31 rue Pêcherie, Romans (Drôme), Francujo, festos la 9an de decembro 1962 la 50an datrevenon de sia oficiala fondiĝo.

Madagaskaro

● **La 18-an de oktobro 1962 okazis en la Ĉambro de Komerco de Tananarivo** la enkonduka konferenco por nova serio de esperanto-kursoj, organizata de la Esperantista Asocio de Madagaskaro. Ĉeestis 140 personoj, preskaŭ ĉiuj junaj madagaskaraj gestudentoj. Prelegoj en madagaskara kaj franca lingvoj estas faritaj, pri la historio, la organizo, la celoj, la atingoj de nia movado. Specimenoj de libroj, de gazetoj, revuoj, ktp, estis prezentitaj al la ĉeestantoj. Okaze de tiu kursinaŭguro, ses diplomoj "Atesto pri Lernado" estis disdonitaj al laureatoj de ekzamenoj de la antaŭa kursoserio. La sekvantan sabaton, la 27-an de oktobro 1962, la veraj kursoj komenciĝis: — Porkomencanta kurso gvidata de S^o Henri Rousseau, al kiu ĉeestis 110 personoj. — Porprogresanta kurso, gvidata de Andriamatoa Frederiko Rasoanaivo, kiun ĉeestis 25 malnovaj fideluloj.

Nederlando

● **La verkisto Maurits Dekker**, aŭtoro de la teatraĵo "La mondo ne havas atendejon", mortis en Amsterdamo la 7an de oktobro post longa malsano, 68-jara. La menciita teatraĵo, kiu traktas problemon koncerne la atomenergion, estis prezentita en Esperanto en pluraj landoj. El Esperanto ĝi estis tradukita kaj ludita ankaŭ en pluraj naciaj lingvoj. Ĉie ĝi havis grandan sukceson, kio multe kontentigis la aŭtoron, sinceran amikon de la Internacia lingvo, trovintan pere de ĝi la vojon al monda publiko.

En 1961 li publikigis, kune kun sia edzino S-ino H. C. Dekker-van Assen — lernejestrino kaj longjara individua membro de UEA — nederlandlingvan legolibron por infanoj 11–14-jaraj sub la titolo "Personecoj kaj Okazaĵoj", en kiu inter rakontoj pri Henri Dunant, la geedzoj Curie, Robert Scott, Antonie van Leeuwenhoek k.a. oni trovas ankaŭ ĉapitron "Mondlingvo; L. L. Zamenhof kaj lia kreaĵo".

Kelkajn horojn post la forpaso de la edzo S-ino Dekker oni trovis morta en ŝia loĝejo. La duoblan cindrigan ceremonion je la 11-a de oktobro, kiun partoprenis multaj nederlandaj verkistoj, eldonistoj kaj aktoroj, flanke de la movado ĉeestis F-ino M. H. Vermaas, direktorino de



Somera Metodika Kurso por Esperantistaj Instruistoj en Gdańsk, Pollando

la Centra Oficejo de UEA kaj Akademiano F. Faulhaber, la tradukinto de la menciita teatraĵo.

Pollando

● **Somera Metodika Kurso por Esperantistaj Instruistoj** okazis en Gdańsk de la 6a ĝis la 26a de aŭgusto 1962, organizita de la Sekcio de Esperantistaj Instruistoj de PEA helpe de la Ministerio de Edukado en Pollando kaj Kuratorejo por Lernejoj Aferoj en Gdańsk. Partoprenis 52 instruistoj de fundamentaj mez- kaj faklernejoj el diversaj lokoj en la lando. La programo entenis 65h. de prelegoj kaj 36h. de praktikaj okupoj. Temoj estis: historio de Esperanto kaj E-movado; historio de E-literaturo; elektitaj problemoj el Esperantologio; metodiko de instruado de Esperanto; elektitaj problemoj pri ĝenerala lingvoscio; modelaj lekcionoj pri geografio en Esperanto; reorganizo de lernejo en Pollando; praktika utiligado de Esperanto en diversaj branĉoj de la scio kaj de la ĉiutaga vivo; Esperanto kiel la unua lingvo de la infano; organizo de junularaj E-rondoj kaj la laboro kun junularo; praktikaj okupoj; praktikaj lecionoj kun disputo; konversacio en grupoj. Ĉe la fino de la kurso la partoprenintoj ricevis atestojn, subskribitajn de la reprezentanto de la Kuratorejo.

● **En ĉambroj de la Junulara Kulturdomo en Łódź** de la 13a ĝis la 30a de majo okazis ekspozicio "Esperanto Instruas Amikecon". La ekspozicion malfermis la vicprezidanto de la Popola Konsilantaro de Łódź, s-ro profesoro Roman Kaczmarek.

Usono

● **En la biblioteko de Gallup, New Mexico, okazis Esperanto-ekspozicio** dum la unuaj tri semajnoj de oktobro. La ekspozicion aranĝis s-ino Roan Orloff Stone, la tradukintino de "La

Profeto" de Kahlil Gibran, ĵus eldonita de Stafeto.

● **"Parkersburg News"**, Parkersburg, West Virginia, la 23an de septembro publikigis artikolon pri George E. Wagner, kiu tre favore raportis pri lia esperantista agado.

● **"El Sol"**, gazeto en Alajuela, Costa Rica, publikigas Esperanto-kurson.

ESPERANTISTA VIVO

Geedziĝoj

Pala-Camboni. S-ano Nino Pala kaj s-anino Marisa Camboni geedziĝis en Cagliari (ĉefurbo de Sardinio) la 25an de aprilo 1962.

Ruig-de Vries. La 19an de oktobro 1962 geedziĝis en la urbdomo de Leeuwarden, Nederlando, s-ro Kees Ruig kaj f-ino Romana Berber de Vries.

Lamby-Feldhues. S-ro Klemens Lamby kaj f-ino Gertrud Feldhues geedziĝis en Ochtrup/Westf., Germanujo la 10-an de aŭgusto.

Fusco-Mazzei. Geedziĝis en Livorno, Italujo, la 30-an de aŭgusto S-ro Mario Fusco kaj f-ino Anna Maria Mazzei.

Jubileo

La 3-an de septembro festis la 80-an datrevenon de sia naskiĝtago S-ro Felix Epstein, Hamburgo, malnova esperantisto. Dum multaj jaroj S-ro Epstein ludis kaj ankoraŭ ludas gravan rolon en la Germana Esperanto-Asocio, kies komitatano A li estas jam de longa tempo en la Komitato de UEA. Ankaŭ en tiu kvalito la jubileanto ĉiam aktive partoprenas la laborojn. En la pasinta jaro S-ro Epstein donacis al UEA 5000 gld. por "Cambro Hamburgo" en la nova domo de UEA.

Ni gratulas kaj bondeziras al S-ro Epstein ankoraŭ multajn jarojn en bona sano.

NEKROLOGO

Staritsky. Forpasis la 25-an de oktobro en Haarlem, Nederlando, S-ro Dementy Pavlovitsj Staritsky en la aĝo de 71 jaroj. Dum longaj jaroj S-ro Staritsky estis aktiva en la movado de sia lando kaj regiono kaj estis kun sia esperantista familio fajrujo de la loka movado.

Nixon. Lastmomente ni ricevis informon pri la forpaso, post longa malsano, de F-ino Violet Nixon, dum multaj jaroj unu el la ĉefaj gvidantoj de la instruista fakorganizaĵo kaj fidela laboranto por Esperanto en Britujo. Pli detala nekrologo sekvos venontmonate.

19-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Vraca, Bulgarujo — 27.VII-3.VIII. 1963

Oficiala Komunikilo

La 19-a Kongreso de T.E.J.O. okazos en Vraca de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1963.

Kotizoj. La kotizoj, kiuj inkluzivas ĉiujn manĝojn, la dormadon en komuna loĝejo, la ekskursojn kaj ĉiujn kongresajn aranĝojn estas, por membroj de TEJO:

malpli ol 20-jaraj 18 US dol.

(ĝis 10-4-1963)

20 US dol. (post 1-4-1963)

pli ol 20-jaraj 20 US dol.

(ĝis 1-4-1963)

22 US dol. (post 1-4-1963)


Nemembroj de TEJO pagas 1 US dol. pli.

Aliĝo. Aliĝilon bonvolu sendi al via landa peranto aŭ rekte al la korespondadreso de la Kongreso (Junulara Kongreso, p.k. 587, Sofio, Bulgarujo). Sendante la aliĝilon rekte al la Kongreso, bonvolu **samtempe** sendi la kotizon al: Bulgara Nacia Banko, Konto: DSK, Blagoevski rajon "BES, BEM 19 Kongreso de TEJO" No. 15/1886.

En kazo de neebleco de partopreno, la aliĝinto povas ricevi la pagitan sumon minus 20%, sed nur kondiĉe ke la peranto kaj la Kongresa Komitato estu informitaj samtempe kaj antaŭ la 1-a de junio 1963.

Aliĝilojn kaj informojn petu ĉe la korespondadreso de la Kongreso.

NOTO — Pro diversaj cirkonstancoj tiu ĉi numero estas enpaĝigita en la C.O. de la direktorino. Kiel kutime, S-ro Auld redaktis ĝin. Sama aranĝo estas farita pri la januara numero.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II SPLIT,
Jugoslavio.

El la landaj sekcioj

JUNULARA LABORBRIGADO

Ĉiujaraj junularaj laboragadoj en Jugoslavio estas io unika kaj tipa por la junularo de tiu lando. Tiujn agadoj ĉiufoje partoprenas kutime 40-50.000 gejunuloj el ĉiuj partoj de la lando. Estas tute kompreneblaj la klopodoj de la Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio ĉiujare sendi sian brigadon al tia agado kaj tiamaniere esti reprezentita tie kien venas reprezentantoj ne nur de ĉiuj lokoj de la lando; sed samtiel reprezentantoj de ĉiuj organizaĵoj en kiuj aktivas junularo. Tio ja estas bonega ŝanco informi la aliajn pri la Internacia Lingvo kaj pri la Esperanto-movado.

Ĉijare estis organizita la kvaran fojon tia brigado. La IV-a Esperantista Junulara Laborbrigado "Stevo Boljević" laboris de la 5-a de Aŭgusto ĝis la 5-a de Septembro ĉe Sutjeska en Bosnio, partoprenante la konstruadon de junulara sportcentro. La brigado konsistis el 54 junaj geesperantistoj el ĉiuj partoj de la lando.

Dank' al la fakto ke la Asocio zorge kaj bone preparis la brigadon, oni povis aŭdi nur laŭdojn kaj komplimentojn pri la organiziteco de la brigado kaj ĝiaj aktivecoj sur ĉiuj kampoj de la agado. La brigado pro tio ricevis eksterordinaran specialan laŭdon kun ora diplomo. Pri tio raportis pluraj nacilingvaj gazetoj, inter kiuj ankaŭ la ĉefa junulara gazeto "Mladost".

Krom tio ke la ĝenerale bona opinio pri la brigado jam havis bonan efikon al la popularigo de nia movado, la brigadanoj faris plurajn aliajn aferojn por ke la partoprenintoj de la laboragado disiru al siaj hejmurboj bone informitaj pri nia movado. Tiucele estis aranĝitaj pluraj prelegoj, disdonita diversa informmaterialo, aranĝita aparte sukcesa ekspozicio ktp. Sendube, la plej interesa afero tiurilate estis la brigada taggazeto kiu aperadis kvarfoje semajne en la Internacia Lingvo kaj dufoje en la nacia lingvo. Dum unumonata restado en la brigado estis eldonitaj 27 numeroj de la gazeto. Laŭ la tradicia principo el la antaŭaj brigadoj, la gazeto havis ĉiun tagon alian nomon. Ĉifoje ĝi ne estis nur amuza, sed ĝi pretendis trovi sian lokon en la tendaro kaj ludi sian rolon tie. Se oni juĝus laŭ la intereso kiu regis pri ĝi, la gazeto sukcesis en siaj klopodoj. Cetere, tio ja estas ĉiuokaze interesa afero kaj verŝajne la sola "taggazeto" en la Internacia Lingvo.

En la brigado funkciis Lingva Kate-dro kiu organizis du konversaciajn kaj unu daŭrigan kursojn. Kelkdeko da brigadanoj ĉe la fino sukcese faris E-ekzamenojn. Krome, funkciis ankaŭ Seminario por la gvidantoj de la junularaj Esperanto-grupoj. La Seminarion partoprenis preskaŭ 40 gebrigadanoj. En la interna vivo de la brigado estis uzata ekskluzive la Internacia Lingvo kaj tio bonege influis la ĝeneralan plialtigon de la lingvoscio.



Kvankam oni ofte similajn laboragadojn nomas "duonsomerumado", ses horojn oni tute serioze laboras.

Estas tute certe ke ankaŭ venontjare junaj Jugoslaviaj geesperantistoj organizos similan laborbrigadon. Se tiu brigado fariĝus internacia, verŝajne realiĝus deziro de multaj gejunuloj esperantistoj.

Simo Milojević

NOVA SEKCIO EN FORA ORIENTO

Kun granda plezuro ni sendas al ĉiuj junularaj organizaĵoj esperantistaj tra la mondo ĝojigan novaĵon, ke en Japanujo estas fondita tutlanda junulara organizaĵo.

En la junulara Fakkunsido de la lastjara Kongreso de Japanaj Esperantistoj, ĉiuj partoprenintoj, responde al la forta deziro de multaj junaj gesamideanoj, decidis komenci preparlaboron por fondi la junularan organizon japanan en la skalo de la tuta lando.

Dum la pasinta unu jaro, ĉiuj preparkomitatoj klopodis koncentrigi la junajn fortojn tra la lando, kaj akcentante la neceson kaj gravan rolon de tiu organizaĵo, kaj organizante la lokajn grupojn junularajn.

En la ĉijara Kongreso de Japanaj Esperantistoj la 26-an de Aŭgusto reprezentantoj de lokaj grupoj kaj individuaj junuloj, en nombro de pli ol okdek, kolektiĝis en la Junulara Fakkunsido, en kiu ili arde diskutis por formuli la statuton kaj konfirmis unuanime la fondon de la nova organizo.

La promesplena nova organizo portas la nomon: Japana Esperantista Junulara Organizo (JEJO) kaj la estraro estas elektita jene:

Prezidanto: Joŝimi Umeda, ĉe Oomoto, Kameoka, Kioto-hu. Vicprezidantoj: Takanori Unoki; Tadaŝi Jamada, Ĝenerala sekretario: Joo Tezuka; Sidejo kaj administrejo: ĉe Japana Esperanto-Instituto, 1-13, Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio.

La nombro de la tuta membraro ankoraŭ ne estas konfirmita, sed tiu ĉi organizo faros certe grandan kaj gravan laboron ne nur por la bono de la Esperanto-movado en Japanujo, sed ankaŭ por solidariĝi tutmondan interfratecon.

Ni kun danko akceptos kuraĝigajn kaj stimolajn vortojn de multaj junaj gesamideanoj tra la mondo.

JUNULARA LITERATURA KONKURSO

Junulara Esperanto-Studrondo en Malmö aldonas al la vico de literaturaj konkursoj ankoraŭ unu. Ĝi celas instigi al verkado la plej junajn — tiujn kiuj ne atingis ankoraŭ dudekkvin jarojn.

Ni bedaŭras, ke pro la ŝanĝo en la redakcio, la regularo atingis la redaktoron tiom malfrue, ke post ĝia apero restos apenaŭ kelkaj tagoj ĝis la fermo de la konkurso. Espereble la juĝkomisiono konsideros ĉi tiun fakton.

1. J.E.S. - Junulara Esperanto-Studrondo en Malmö estigas inter ĉiuj ĝis 25-jaraĝaj geesperantistoj literaturan konkurson por la premio "J.E.S.".
2. La konkurso estas anonima. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj en aparta fermita slipo oni aldonu siajn nomon kaj adreson.
3. La prozaj aŭ poeziaj konkursaĵoj, en nelimigita kvanto, estu senditaj en tri maŝinskribitaj ekzempleroj al la Sekretario de la Konkurso.
4. La juĝkomisiono havas je dispono du premiojn: unua por 100 svedaj kronoj kaj dua por 50 svedaj kronoj.
5. Al la konkurso ne rajtas partopreni la anoj de J.E.S. nek la juĝantoj.
6. KVINPINTO, organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, detenas por si la rajton publikigi la premiitajn kaj aliajn konkursaĵojn.
7. Limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 15a de decembro 1962. La rezulton oni diskonigos la 28an de januaro 1963.

Sendu ĉion al Franko Luin, "JES-Konkurso" Dag Hammarskjölds väg 2, Lund, Svedujo.



48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sofio, 3-10 Aŭgusto 1963

Konstanta Adreso: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3

Rotterdam, la 15-an de novembro 1962
Glumarkoj:

Por kontentigi la deziron de multaj esperantistoj, kiuj ŝatas ornamojn siajn leterojn per belaj glumarkoj kaj kiuj kutimas tiamaniere propagandi Esperanton, la 48-a Universala Kongreso de Esperanto eldonis belan ok-koloran glumarkon.

La glumarko estas nunjare vendata je tre malalta prezo:
0,45 ned.gld. (1,80 steloj) por unu folio po 10 pecoj;
1,25 ned.gld. (5.— steloj) por 3 folioj.

La glumarko estas aĉetebla ĉe la Libro-Servo de U.E.A. kaj ĉe la Landaj Asocioj.

Karavano:

Anoncis karavanon al Sofio S-ro Joel Vilkki, Somero, Finnlando.

Senpagaj Partoprenoj:

Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la 48-a Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petataj anonci sin ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Statistiko (ĝis 15/11/1962):

Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 2, Brazilo 2, Bri-

tujo 19, Bulgarujo 29, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 36, Germanujo 13, Hispanujo 3, Hungarujo 2, Israelo 1, Italujo 8, Japanujo 3, Jugoslavio 13, Madagaskaro 1, Monako 3, Nederlando 14, Norvegujo 4, Novzelando 1, Pollando 5, Svedujo 20, Svisujo 3, Usono 2.

Entute 202 el 27 landoj (pasintjare 178 el 27 landoj).

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario



La partoprenintoj en la Eŭropa Ferio-Semajno en Svislando, kiu okazis de la 2a ĝis la 8a de septembro sur la Oberbalmberg. Similan semajnon oni organizos de la 1-a ĝis la 7a de septembro 1963. Programojn oni ricevos de Esperanto-poŝtfako 417, Aaraŭ, Svislando.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.
Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Radio Roma. 4-XII, Tra la literaturo; 7-XII, Mondfama itala loko Campi Flegrei; 11-XII, Novaĵoj el Italujo; 14-XII, La pliamo de Jesuo al la blinduloj; 18-XII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-XII, Itala arĥeologia urbo Ostia Antikva; 25-XII, Leterkesto; 28-XII, Sankta Klara, patronino de la radio-televido. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede).

Svisa Radio. La vespera programo estas nun elsendata per ondoj 48.66m., 31.46m., 31.07m., 25.61m. Prelegantoj: D-ro Arthur Baur (lunde kaj ĵaŭde) kaj Prof. Charles Ecabert (merkrede kaj sabate).

Pola Radio. Novaj ondlongoj: 200m. (1502 kcs), 49.88m., 49.38m., 42.11m., 41.99m., 41.27m., 31.45m., 31.01m.; ĉiutage je la sama horo.

Radio Hilversum (N.C.R.V.). Programo de Kristana Esperanto Ligo Internacia per ondlongo 298m. aŭ 402m. 3-XII, Ĉu vi partoprenas en la spacveturado? (S-ro R. van Spronsen); 7-I, parolado de S-ro Joh. van Keulen; 4-II, Grandvalora trovaĵo (F-ino C. Westerveld).

SOFIO – DUA INTERNACIA ARTA FESTIVALO – SOFIO

El la Centra Oficejo

Jarlibro. Aperis en oktobro, kun granda prokrasto kies kaŭzoj estas jam plurloke klarigitaj, la Jarlibro 1962. Dum ni skribas tiujn ĉi liniojn, la Dua Parto estas presata kaj ĝi estos ekspedita komence de decembro.

Reklamoj. Jam estas en preparo la Jarlibro 1963. Por ĝi multajn reklamojn ni jam ricevis, sed ni atendas ankoraŭ pliajn. Ĉiuj niaj varbantaj delegitoj kaj membroj bonvolu atenti, ke 31.12.62 estas absolute la plej lasta dato je kiu ni povos akcepti reklamojn. La tarifo ne ŝanĝiĝis: 80 gld por tuta paĝo, pli malgrandaj proporcio (vidu kotiztabelon en Jarlibro).

Administrado. Ni praktike venkis la malfacilaĵojn estiĝintajn pro translokiĝo kaj manko de oficistoj. Multege niaj membroj kaj korespondantoj povos helpi al glata funkciado per mallongaj klaraj leteroj. Oni ne metu mendojn en mezo de longa vivpriskribo, oni ne skribaĉu sur poŝtkarton tekston longan por tutpaĝa letero. Se iel eble, oni skribu maŝine kaj nepre oni skribu sur aparta papero por la Libroservo, por la Kongreso kaj por la gazeto. Gravege ankaŭ por propra intereso de la sendanto: **neniam sendu poŝtmandaton ne indikinte sur ĝi ĝian celon** aŭ referon al letero pri tiu celo. Tio evitigas gravajn konfuzojn. Multaj niaj korespondantoj jam kutimas agi laŭ la ĉi surraj indikoj kaj ilin ni varme dankas pro ilia helpo.

Direktorino C.O.


POR VIA RESTADO EN SOFIO :

Jam studu la kirilan alfabeton !

А а = a	К к = k	Ф ф = f
Б б = b	Л л = l	Х х = h
В в = v	М м = m	Ц ц = c
Г г = g	Н н = n	Ч ч = c
Д д = d	О о = o	Ш ш = ŝ
Е е = e	П п = p	Щ щ = ŝt
Ж ж = j	Р р = r	Ъ ъ = u
З з = z	С с = s	Ь ь = nj
И и = i	Т т = t	Ю ю = ju
Й й = j	У у = u	Я я = ja

Ŝaka Rubriko

Gvidas D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio
Problemo n-ro 24 (konkurso 1962 - n-ro 8) E. B. Cook :



Mato en 2 movoj. Pro ĝusta solvo 2 poentoj
Kontrolo : Blanko : Ra6, De2, Th5, Ĉcl, Ĉc8, Kf5, p.h7
Nigro : Rf6, Dal, Kh8, p. : a2, f7, h6
Solvojn sendu ĝis 31.3.63 al gvidanto de la rubriko.

BALDAŬ APEROS LA NEELDONITA VERKO DE D-RO L. L. ZAMENHOF.

La 4-a volumo de la zamenhofa traduko de la "Fabeloj" de H. C. Andersen, kiu, pro militaj kaŭzoj, restis ĝis nun neeldonita, aperos en februaro 1963.

La libro enhavos 24 fabelojn de la fama dana verkisto. Ĝi ampleksos supozeble 224 paĝojn kaj estos ilustrita per 50 artaj desegnaĵoj (el kiuj 10 tutpaĝaj kaj 20 duonpaĝaj) speciale faritaj por la Esperanto-eldono de unu el la plej elstaraj polaj nuntempaj artistoj, A. Uniechowski.

La "Fabeloj" de Andersen estas eldonataj de "Heroldo de Esperanto".

LA ĈAMBROJ DE U.E.A.

Ekde la Kongreso en Harrogate ni de tempo al tempo anoncis la ĉambrojn donacitajn. Por ke niaj membroj havu superrigardon kaj eble ricevu inspiron, ni ĉi sube resumas :

Ricevitaj estas la sumoj de 5000.— gld. por

1. Ĉambro-Kanado, donacis S-ino Dorothy M. Henderson, King;
2. Ĉambro-Hamburgo, donacis S-ro Felix Epstein, Hamburg;
3. Ĉambro-Louise Francina Kakebeeke (antaŭe anonima);
4. Ĉambro-Llech-Walter, donacis S-ro R. Llech-Walter, Perpignan;
5. Ĉambro-Monte-Carlo, donacis Ges. Jos Derks, Monaco;
6. Ĉambro-Minnaja, donacis Familio Minnaja, Roma.

Kolektataj kaj parte ricevitaj estas la sumoj por

7. Ĉambro-Broye, donacata de S-ro A. M. Brya, Urbana, Ill., Usono;
8. Ĉambro-Svedujo, donacata de Sveda Esperanto-Federacio;
9. Ĉambro-Arabio, donacata de S-ro Nassif Isaac, Qatar.

RESPONDO AL LETERO PUBLIKIGITA EN N-RO 9

Mi klopodos respondi mallonge al la letero de S-ino Zacho kaj S-roj Neergaard kaj Pompilio. Unue, mi devas klarigi, ke mi ne kritikis la novan organizan strukturon pro "malico" aŭ kun la celo subfosi la Kongreson, sed, ĉar, estinte ses jarojn KKS kaj estante ankoraŭ nun profesia organizanto de internaciaj kongresoj, pli ol kiu ajn alia mi havas sperton kaj kompetentecon pri la temo.

Mi konservas miajn antaŭajn asertojn, interalie, ke la Kopenhaga informado estis nesufiĉa kaj kvalite nekontentiga. Mia konvinko baziĝas sur la nombro da oficialaj komunikoj, sur la nombro kaj frueco de la entenitaj informoj kaj sur la nombro kaj nivelo de la aperintaj artikoloj. Mi ankaŭ konfirmas, ke — sen ludi pri vortoj — ĉiŝoj ne ĉiuj Kopenhagaj grupoj estis reprezentitaj en LKK. Mi havas pri tio formalan leteron de la plej granda neŭtrala societo de la urbo, kiu organizis la 41-an U.K. Mi neniam asertis, ke kongreso kun 1550 aliĝintoj estas en si mem malgranda. Ĝi estas malgranda kompare al urbo kiel Kopenhago, kiu antaŭ ses jaroj altiris 2200 esperantistojn.

Diskuti nun pri Kopenhago estas anakronismo. Multe pli grava kaj aktuala estas la estonteco de niaj kongresoj, nome la demando, ĉu la nova regularo estas pli taŭga ol la antaŭa aŭ ne.

Por ŝanĝi regularon

Por ŝanĝi regularon, necesas almenaŭ du kondiĉoj: 1) pruvi, ke la ĝistiamaj principoj donis malbonajn rezultojn; 2) pruvi, ke deziro pri ŝanĝoj larĝe montriĝas je ĉiu nivelo de la Movado.

Tiujn du pruvojn ĝis nun mi vane atendis. Niaj postmilitaj kongresoj bone prosperis, havis sanajn financojn (eĉ kiam la kotizo estis la duono ol nun) kaj regule donis profiton ĉiujare. La peto pri ĝenerala ŝanĝo alvenis subite. La proceduro sekviĝis por akceptigi la ŝanĝojn okazis, laŭ mia opinio, en atmosfero de urĝo. Pluraj Komitatanoj kaj prezidantoj de Landaj Asocioj ne ĉeestis la Kongreson kaj ne povis partopreni en la diskutoj. Mi opinias, ke kvankam la Komitato estas suverena kaj rajtas decidi sen konsulti iun ajn, por tiel grava afero ĝi estus devinta aŭdi vaste la opinion de ĉiuj kompetentaj esperantistoj, nome de la antaŭaj LKK-anoj, kaj esplori la sintenon de la Landaj Asocioj.

Laŭ mi, du eraraj elirkonceptoj

La unua troviĝas en la klarigoj, kiuj akompanis la ŝanĝproponon: *"Per centralizo kaj ebligado de rekta kontrolo atingi konsiderindan ekonomiigon de la tuta Asocia mas-trumado"*.

Kian "centralizon" celis la proponintoj? La sola "centralizo" plenumita estas la forpreno de la administrado for de la kongresurbo. Kie estas la konsiderindaj ŝparoj? La Estraro, krom la salajro de la KKS, devas nun pagi ankaŭ la plurajn vojaĝojn de la KKS al la kongresurbo kaj la "ekstrajn kostojn de lia restado en la kongresurbo" (Art. 30), kio ne necesas antaŭe.

La dua erara (laŭ mi) elirkoncepto estis jene esprimita: *"Dum parto de la jaro la KKS, do, povas fari ankaŭ aliajn laborojn kaj dum parto aliaj helpas lin"*.

Pri kiaj "aliaj laboroj" oni parolas? Kiom da ili estis efektive plenumitaj en la lasta jaro? La U.K. estas tiel ampleksa kaj kompleksa aranĝo, ke ĝi ne lasas al la KKS tempon por aliaj funkcioj.

Laŭ mia opinio, la rapida proceduro kaj la eraraj konsideroj kaŭzis la ĥaosan kunmiksiĝon en la nova teksto de malnovaj kaj novaj konceptoj. Ekz. la LKK havas revizorojn (Art. 7 kaj 34), sed la tuta administrado kaj librotenado estas farita en Rotterdam (Art. 17); la KKS restas membro de LKK (Art. 7), kvankam oni ne povas esti membro de loka komitato, kiam oni loĝas en eksterlando.

La pozicio de LKK kaj de la Landaj Asocioj

La rolo de la Landaj Asocioj estas, laŭ mi, malgrandigita minimume en tri punktoj: en la elekto de la kon-

gresurbo, en la aprobo de LKK kaj en la divido de la eventuala profito.

En la unua postmilita regularo, la Landaj Asocioj ricevis 33; 33% de la eventuala profito, en la dua 30% kaj en la nuna 18%. Multe pli grava estas la fakto, ke U.K. povas nun okazi sen la aprobo aŭ kontraŭ la volo de la Landa Asocio. Mi opinias, ke la Landaj Asocioj estas suverenaj pri la aktivecoj, kiuj okazas en ilia propra teritorio kaj sub la leĝoj de iliaj landoj. La sperto montras, ke malrespekto de tiu principo alportas nur malharmonion, kverelojn kaj disputojn.

La LKK antaŭe ĝuis pri la surloka kunlaboro de la KKS dum 11 monatoj. Mi memoras, ke en Marseille, Kopenhago, Mainz, Varsovio, Bruselo kaj Harrogate miaj kontaktoj kun la LKK-anoj estis ĉiutagaj. Ni kune diskutis la leterojn, studis la problemojn, kontroladis tagon post tago la aliĝadon kaj la financojn: ni kune decidis. Mi ne estas konvinkita ke korespondado aŭ sporadaj vizitoj povas anstataŭi la personajn rilatojn. Mi ne estas konvinkita, ke la LKK preferas ne ricevi en la kongresurbo la leterojn de la kongresanoj kaj ke ĝi ŝatas havi la kongresan monon en nederlanda banko kaj pri ĉio dependi de la bonvolo de la oficistoj de la C.O.

La lokaj esperantistoj, krome, perdis okazon de vasta propagando de Esperanto. La ekzisto de KKS, kiu vojaĝas de lando al lando por Esperanto, per Esperanto, estis vivanta pruvo de la utileco de nia lingvo kaj de la forto de nia Movado. En la antaŭaj jaroj, grandaj kaj malgrandaj gazetoj kaj radio-stacioj dediĉis al tiu profesio ampleksajn artikolojn: dum la tuta jaro la KKS vizitis aŭtoritatojn, traktis kun urbaj administracioj, prelegis en lernejoj kaj en organizaĵoj, malfermis kaj gvidis kursojn, donis intervjuojn, verkis artikolojn por nacilingvaj gazetoj, partoprenis en grupaj kunvenoj, regionaj renkontiĝoj, seminarioj, kongresoj, faris prelegvojaĝojn, prezidis manifestaciojn, ktp. ktp.

La funkcio de KKS

La profesio de KKS fariĝis post la ŝanĝoj de la regularo malpli elstara. Ĝi fakte plu ne ekzistas kiel la esperantistoj konis ĝin. La KKS devas sidi grandan parton de la jaro en Rotterdam. Antaŭe li respondecis rekte al la Estraro pere de la estrarano por kongresoj. Nun li respondecas al la direktor(in)o de la C.O., kiu siavice respondecas al la Estraro pere de la menciita estrarano.

Persona opinio

Ŝajnas al mi, ke ne ekzistis gravaj motivoj por aliformigi la regularon. Mi estas konvinkita, ke administra centrigo estas multekosta metodo, kiun la modernaj tempoj rifuzas. Mi kredas, ke estus pli bone restarigi grandparte la antaŭan sistemon, malgrandigi la licencpagon de 30% al 20%, malcentrigi la povojn, malpezigi la Centran Oficejon, klarigi la rolon de KKS kiel konsilanto de LKK kaj kiel reprezentanto de la Estraro, reunuigi la organizaĵon kaj la administradon en la Kongresurbo kaj entute simpligi la kongresan regularon.

G. C. Fighiera

Postskribo: Kvankam la supra letero ne estas respondo al la (responda) letero aperinta en la sept. no. de "Esperanto", sed nur ripeto de jam faritaj kaj jam refutitaj asertoj, tamen ĝi ne estas rifuzita. La legantoj juĝu mem, precipe tiuj, kiuj ĉeestis la Kopenhagan Kongreson. Ni nur aldonu la jenajn informojn: LKK-Kopenhago estas tute kontenta pri la funkciado de la nuna Kongresa Regularo kaj ĝi opiniis eĉ, ke KKS estus povinta restadi malpli longe en la kongresurbo ol li efektive faris (ĉ. 6 monatojn); la nuna KKS ne estus akceptinta sian funkcion laŭ la malnova Regularo, ĉar li opiniis ĝin malpli oportuna kaj el vidpunkto de la laboro kaj el persona vidpunkto; LKK-Sofio estas tre kontenta pri la nuna situacio kaj la bonega kunlaboro kun KKS kaj C.O. Do, ni iomete atendu la ceteran evoluon.

Diskuto finita — Red.

Dir. C. O.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 352

Alĝerio

Alger (Algerie)
FD (Naturscienco) : vakas.
Constantine (Constantine)
FD (Tendumado) : vakas.
Maison-Carree (Alger)
D : vakas.
Nemours (Tlemcen)
D : vakas.
FD (Edukado) : vakas.
Oued-Athménia (Constantine)
D : vakas.

Aŭstralio

Kolgoolie (Okcidenta Aŭstralio)
D : vakas.

Argentino

Buenos Aires (Capital Federal)
VD : vakas.

Belgujo

Bruselo (Brabant)
FD (Turismo) : vakas.
Gent (Oost-Vlaanderen)
FD (Plastikaj Artoj) : vakas.
Millen (Limburg) 1.500
D : S-ro Louis Geukens, bieno-
posedanto, Langstraat 102.

Brazilo

Caneia (Rio Grande do Sul)
D : vakas.
Juiz de Fora (Minas Gerais) 183.000
FD (Turismo) : S-ro João Oliveira
Gama, militisto, Rua Rui Barbosa 81.
FD (Librotenado) : vakas.
Ourinhos (São Paulo)
D : vakas.
Petrolina (Pernambuco)
D : vakas.
Rio de Janeiro (Distrito Federal)
FD (Framasonismo) : vakas.
FD (Instruado) : vakas.
FD (Komerco) : vakas.
FD (Radio) : vakas.
FD (Sukerfabrikado) : vakas.
Tanabí (Estado S. Paulo)
D : vakas.
Teresópolis (Rio de Janeiro) 52.400
D : S-ro Jozefo Joels, instruisto, Rua
Carmela Dutra 835, ap. 107.
Uberaba (Minas Gerais)
D : vakas.

Britujo

Bath (Somerset)
D : vakas.
Folkestone (Kent)
FD ,Antibiotikoj) : vakas.
Glasgow
FD (Religio) : vakas.
Perranporth (Cornwall)
JD : vakas.

Cejlono

Colombo (Western Province) 361.000
D : D-ro C. H. Dharmatilake, kura-
cisto, 87-89 High-Level Road.

Ĉeĥoslovakujo

Košice (Slovensko) 104.000
FD (Arkitekturo) : S-ro Jan Werner,
Inĝeniero-arkitekto, Vodárenská 8.
Kralupy nad Vltavou (Čechy)
D : vakas.
Ústí nad Labem (Čechy) 60.000

D : S-ro Vlastimil Novobilský, ke-
miisto, Slavíkova 346.
FD (Kemio) : la D.

Danlando

Holbak (Selando)
FD (Poŝto) : vakas.
Lyngby (Sjaelland)
VD : vakas.

Finnlando

Helsinki (Vartiokylä)
VD : vakas.
Isokyrö (Vaasan lääni)
D : vakas.
Kemi (Lapin lääni)
D : vakas.
Lappeenranta (Kymen lääni)
FD (Oficistaj aferoj) : vakas.
Pori (Turun ja Porin lääni)
VD : vakas.

Francujo

Châtellerault (Vienne) 30.000
D : S-ro Feodor Jelenc, (licea profe-
soro), 53, Rue A. Fradin.
Dieppe (Seine-Maritime)
FD (Akvodistribuo) : vakas.
Laon (Aisne)
JD : vakas.
FD (Protestantismo) : vakas.
Montreuil (Seine)
FD (Edukado) : vakas.
FD (Turismo) : vakas.
Nancy (Meurthe & Moselle)
FD (Abelbredado) : vakas.
Paris
FD (Geografia terminologio) : S-ro
Robert Gérard, emerita instruisto de
liceo, 45, Rue de Vouillé.
FD (Turismo) : S-ro Maurice Rétot,
instruisto, 149 avenue Gambetta.
Saint-Quentin (Aisne)
D : vakas.
Sologne (Saône-et-Loire) 460
FD (Terkulturo-Vinberkulturo) :
S-ro F. V. Mathias, vinberkulturisto.

Germanujo

Bad Kreuznach (Rheinland) 39.000
D : S-ro Hermann Hommer, komerca
instruisto, Rheingrafenstr. 14.
Bad Pyrmont (Niedersachsen Hann-
over)
D : vakas.
FD (Katolikismo) : vakas.
Braunschweig (Niedersachsen)
D : vakas.
FD (Fervojo) : vakas.
Düsseldorf (Nordrhein-Westfalen)
FD (Lingvo Germana) : vakas.
Euskirchen (Rheinland)
D : vakas.
Hamburg-Bergedorf (Hamburg) 50.000
FD (Astronomio) : S-ro Erik Høg,
astronomo, Sternwarte 205.
Mosbach (Hessen)
D : vakas.
Nurnberg (Bayern) 480.000
FD (Filatelo) : S-ro Ludwig Pickel,
librotenisto, Welsersstraat 69.
FD (Poŝto) : S-ro Johann M. Raab,
poŝtoficisto, Austrasse 84.
Würselen (Nordrhein-Westfalen)

D : vakas.
FD (Religio-Katolikismo) : vakas.
Hispanujo

Alicante (Alicante)
D : vakas.
Jaén (Andalucia)
D : vakas.
Las Palmas de Gran Canaria (Kanaria
Insularo)
FD (Katolikismo) : vakas.
Oviendo (Oviedo)
D : vakas.

Indonezio

Djakarta (Java)
D : vakas.

Irlando

Dublin
FD (Turismo) : vakas.

Italujo

Belluno (Veneto)
D : vakas.
FD (Terkulturo) : vakas.
Biella (Vercelli)
JD : vakas.
Borgo a Buggiano (Pistoia)
D : vakas.
Milano (Milano)
D : vakas.
FD (Scienco) : vakas.
Mirandola (Modena) 25.000
D : S-ro Roberto Veronesi, instruisto,
Via Cavour n. 5-A.
FD (Komerco) : la D.
Napoli (Napoli)
FD (Komerco) : vakas.
Pisa (Pisa) 70.000
FD (Fiziko) : D-ro Nicola Minnaja,
Fizikisto, Via Vespucci 71.
Trapani (Sicilia)
D : vakas.

Japanujo

Tôkyô (Tôkyô-to) 10.000.000
FD (Sociaj sciencoj) S-ro Tarô Ni-
ŝiumi, universitata profesoro de
nuntempa historio, 6-443 Koiŭa-ĉo,
Edogaŭa-ku
Yawata (Hukuokaken)
D : vakas.

Kanado

Ottawa (Ontario)
D : vakas.
FD (Religio-Katolikismo) : vakas.

Kubo

Camagüey (Cam.)
D : vakas.
FD (Ekonomio) : vakas.

Malto

Qormi
D : vakas.

Nederlando

Heerde (Gelderland) 13.000
D : S-ro Uut Medema, oficisto, Wa-
penvelderkerkweg 10 a.
FD (Naturismo) : la D.

Norvegujo

Gjovik (Oppland)
D : vakas.
Leknes i Lofoten
D : vakas.
Trondheim
FD (Skoltismo) : vakas.

Novzelando

Christchurch
D : vakas.

Portugalujo

Funchal (Madejro)

FD (Turismo) : vakas.

Sacavém 15.000

FD (Mekaniko) : S-ro Américo Esteves de Almeida, industriisto, Primeira Rua Particular AEA, Figo Maduro.

Reunio

Saint Joseph

D : S-ro André Grondin, instruisto, "Lianes".

Svedujo

Ängelholm (Skåne)

VD : vakas.

Huskvarna

VD : vakas.

Lindesberg (Västmanland)

D : vakas.

Skövde (Västergötland)

FD (Filatelo) : vakas.

Uppsala (Uppland)

D : vakas.

JD : vakas.

Svislando

Neuchâtel

FD (Scienco) : vakas.

Turkujo

Bursa

VD : vakas.

Urugvajo

Montevideo (Montevideo)

FD (Katolikismo) : vakas.

Paysandú

D : vakas.

Usono

Angwin (California)

D : vakas.

Berwyn (Illinois) 54.224

D : S-ino E. G. Simonek-Pfleger, piedkuracistino, 2347 Harvey Ave.

Bethlehem (Pa.) 15.000

D : S-ro Donal L. Munro, elektra inĝeniero, 1034 Elm Street.

Escondido (California)

D : vakas.

Floral Park, Queens (New York)

D : vakas.

Lakewood (California)

D : vakas.

Long Beach (California)

FD (Juro) : vakas.

Quakertown (Pennsylvania)

D : vakas.

Riverdale (Maryland)

D : vakas.

FD (Fervojo) : vakas.

Washington (District of Columbia)

FD (Katolikismo) : vakas.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

De Smet, S-ro W, Antwerpen, Belgujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

457. Dixon, S-ro R. H. Hastings, Novzelando. 458. Smith, S-ro Harold W., Christchurch, Novzelando. 459. Scherrer, S-ro Joseph R., Los Angeles, Usono.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato: 265 MA, 34 MJ, 7 J-MJ kaj 1 J-MA.

Torinaj esperantistoj : 15 MA kaj 1 MJ laŭ jena detaligo: Prof. E. Lo Martire 2.90 gld.; S-ro R. Beltrame 5.80 gld.; Prof.ino Cl. Conterno 207.60 gld.; F-ino A. Girolodi 5.80 gld.; S-ro R. Varrone 4.60 gld.; S-ro Andreis 2.90 gld.; G.B. 2.90 gld.

Entute: 280 MA, 35 MJ, 7 J-MJ kaj 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

FONDAJO DOMO

F-ino E. M. Maasbommel, Nederlando, 50.— gld., Novzelandaj Esperantistoj 390.— gld. (laŭ jena detaligo:) anonimulo, 10.— gld., S-ro D. Cornes, 5.— gld., S-ro W. Dean, 25.— gld., S-ino F. McGregor, 10.— gld., S-ro M. J. McNamara, 200.— gld., S-ino M. Morrison, 5.— gld., S-ro G. J. Pivac, 50.— gld., S-ro E. V. Warren, 30.— gld., S-ro F. Wood, 50.— gld., S-ro H. W. Smith, 5.— gld. Ĉiuj donacintoj de minimume 50.— gld. estas enskribitaj en la "Ora Libro pri la Domo". Malavare donacu por la propra sidejo de la asocio !

POR VASTIGO DE LA AGADO

(Laŭ Estrara letero de 21.5.1962).

S-ro S. H. Grant, Port Lincoln, 7.75 n.gld., Polygot Book Depot, Melbourne, 10.— n.gld., F-ino F. H. Kemp, Melbourne, 50.— n.gld., ĉiuj el Aŭstralio; Esperanto Klubo "Verda Stelo", Steyr, 42.— n.gld., F-ino Wilma Diamand, Wien, 15.— n.gld., ambaŭ el Aŭstrujo; S-ro Francisco Panis, Itapeva, Brazilo, 7.50 n.gld., F-ino M. Clarke, Newcastle upon Tyne, 10.— n.gld., F-ino Edith E. Mason, Paignton, 10.— n.gld., ambaŭ el Britujo; S-ro L. Belhoste, Pontenay, 37.50 n.gld., S-ro Alano Ringotte, Roubaix, 7.50 n.gld., S-ro J. M. Mealin, Paris, 3.75 n.gld., ĉiuj el Francujo; S-ro G. Miggas, 12.— n.gld., S-ro S. Sakellaropoulos, Athinai, 15.— n.gld., S-ro A. Spiridis, 12.— n.gld., ĉiuj el Greklando; S-ro Manual Diaz Camacho Argual, Tenerife, 9.37 n.gld., S-ro F. García V., Las Palmas, 15.— n.gld., ambaŭ el Hispanujo; S-ro Baldvin B. Skaffell, Reykjavik, Islando, 7.20 n.gld.; S-ro Wong Kenn, Macau, Hong Kong, 10.— n.gld.; S-ino Doris M. Worcester, Ayabe-shi, Japanujo, 30.— n.gld.; S-ino A. C. H. v. d. Beek-Kelly, 1000.— gld., S-ro J. Th. de Goey, Rotterdam, 10.— n.gld., ambaŭ el Nederlando; S-ino Helge Hermansen, Oslo, Norvegujo, 15.— n.gld.; S-ro E. M. Shaw, Wanganui, 80.— n.gld., Novzelando; S-ro N. Hardick, Cape Town, Sud-Afriko, 13.40 n.gld.; S-ino Anna Wedholm, Upsala, Svedujo, 10.— n.gld.; S-ro David K. Jordan, Chicago, Usono, 10.80 n.gld.

Entute ricevita ĝis 31.10.1962 la sumo de 11.579.12 n.gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

MULTAJ FLUETOJ FARAS GRANDAN RIVERON !

Dum la pasinta jaro la poŝtmarkkolektado malkreskis. La kaŭzo estas, ke tro malofte aperis alvoko en nia revuo. La subskribinto kulpas. Kelkaj fervoraj kolektantoj esas daŭre fidelaj, ekzemple s-ro Conrad Fisher, 808 Stewart, Meadville, Pa., Usono, kiu presigis slipojn en la angla: "Save used stamps for Esperanto ! Cut from envelopes and send them to me UNDA-MAGED !"

Tiamaniere s-ro Fisher kolektas multajn poŝtmarkojn de neesperantistoj. De multaj firmaoj kun ampleksa korespondado oni facile povus akiri la poŝtmarkojn. Jen tasko por junaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne ŝarĝiĝis per "pli grava" laboro. — Sendu daŭre al

Peter Zacho, Randbølvej 4,
Kopenhago F.

ANONCETOJ

Prelegu per diapozitivoj: Informos: Lentaigne, 3 Gaillarde, Montpellier, Francujo. Represo urĝe petata en pagipovaj landoj.

Esperanto Internacia Academy Travel Ltd., 17 Tottenham Court Road, London W. 1, estas vojaĝagentejo, kiu organizas grupojn speciale profesiaj k.s. societoj, ankaŭ por esperantistoj. Uzu ĝiajn servojn.

Letervespero, respondo garantiita. Petas salutojn okaze de letervespero en februaro 1963, Watford Esperanto-Societo, 424 St. Albans Rd., Watford, Herts., Anglujo.

18-jara ĉeĥa junulo deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj gramofondiskojn kun gejunuloj kaj pli maljunaj homoj el la tuta mondo. Intereso: naturscienco kaj geografio. Stanislav Kareš, Polšt ĉp 47, P. Miletin, u Horie v Podkrkanoši, Ĉeĥoslovakio.

Deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun esperantistoj en Okcident-eŭropo, Sud-eŭropo kaj Finnlando, 38-jara s-ro G. van Noort, Linnaeuslaan 91, Utrecht, Nederlando.

Diversaĝaj kursaninoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Nowa Sól, Skrytka 26, Pollando.

Kanado, Junaj geedzoj serĉas kanadajn gekorespondantojn. Nepre respondos. S-ro Vimala Devi, Rua Emilia Neves, 27, 2º, esqº, Lisbono 4, Portugalujo.

Ioan Crancau (33-j. laboristo), Via Alexandri 48 Baia Mare (Rumanio) serĉas sincerajn korespondantojn por interŝanĝi bildkartojn kun Usono, Suda Ameriko, Afriko, Okcidenta Eŭropo kaj Oceanaj Insuloj.

LA ORGANO DE LA
INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA ESTAS

espero katolika

fondita en 1903

24-paĝa, ilustrita monata revuo kun aktuala enhavo. Ĝi enhavas aldone ĉiun duan monaton almenaŭ 8 paĝojn el la Sankta Skribo, kun komento, tiel ke oni povas kolekti tiujn aldonojn por poste bindigi ilin. Jarkotizo : ned.gld. 6,— + 1,— por la bibliaj aldonoj. Ĉiu katolika Esperantisto estu membro de I.K.U.E. resp. abonanto de ESPERO KATOLIKA.

Petu provekzempleron ĉe la Centra Oficejo de I.K.U.E.


Frederikstraat 2, Dordrecht (Nederlando)

Poŝtkonto: no. 214009 je la nomo de f-ino Durenkamp

Petu provnumeron !

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo".

Adreso : **Internacia Katolika Informejo,**
Gasthuisstraat 68, TILBURG, Nederlando



LA
INTERNACIA
AFISO

Kvarkolora
Moderna
Kun taŭga
blanka spaco
por naci-
lingva
teksto

Prezoj :

Formato	po	1 ekz.	0.20 gld. (0.80 steloj)
41,5 × 59 cm:	po	100 ekz.	18.— gld. (72.— steloj)
	po	1000 ekz.	165.— gld. (660.— steloj)

Formato	po	1 ekz.	0.40 gld. (1.60 steloj)
58,8 × 83,2 cm:	po	100 ekz.	36.— gld. (144.— steloj)
	po	1000 ekz.	330.— gld. (1320.— steloj)

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo
Uzu ĝin por via aŭtuna kampanjo

PACAMANTOJ !

Memoru antaŭmendi la periodaĵon "NOVA MONDO", samtempe sendante 2 : — sv. kr. aŭ egalvaloron por la kostoj. — Estas tre grave ke ĝi aperu ! Unika kaj gravega artikolaro jam anoncita ! — Cetere vidu la anoncon en la aprila numero de "Esperanto".

Adr.: Gunnar Rugland, ĉe Rönnell, Hornsgatan 89II, Stockholm Sv., Svedujo.

Oni ankaŭ povas mendi la periodaĵon, kaj ni poste enkasigos la monon.

ERNA

Jus aperis ĉarmega infanlibreto

KION ERNA TRAVIVIS EN PINURBO

Rakonto por junaj naturamantaj infanoj.
Verkis originale en Esperanto

Bep Slösser-Bresler

Eldonis I.K.U.E.

Prezo : 1,50 gld. 6 steloj

Mendu ĉe U.E.A. !

UNESCO AFIŜOJ

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanto-teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESCO Prezo : 4 int. resp. kuponoj aŭ egalvaloro por la tuta serio.

Krome, ricevebla ĉe U.E.A.

UNESCO COURIER

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O., decembro no. 1959, enhavanta

grandan artikolon pri Zamenhof

Tiu numero en angla, franca, hispana aŭ rusa lingvo estas ricevebla ĉe la landaj U.N.E.S.C.O.-instancoj kaj ĉe U.E.A.

Montrinda al ĉiuj neesperantistoj

Prezo : inkl. sendkostojn : 0,50 gld; 2 steloj.
Mendante, indiku la deziratan lingvon !

La 10-a de decembro: Tago de la Homaj Rajtoj

KREDO FLOROJ DINAMITO

Tri biografiaj rakontoj pri Birgitta, sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo de la floroj, fondinto de la moderna botanika scienco, kaj pri Nobel, la industriulo kaj inventinto de la dinamito, kiu tamen ankaŭ iniciatis la nobelpremiojn. La libro estas originale verkita en Esperanto de la juna sveda fizikisto kaj instruisto d-ro Ernst Olsson. Redaktis G. Henriksson.

La zorge kaj plaĉe redaktita libro bonega prezentas, kiel oni povas majstri Esperanton eĉ pri sciencaj studoj. Laŭ mia opinio ĝi meritis, ke ĝi estu vaste aĉetata kaj legata. (El recenzo en Germana Esperanto-Revuo.)

80 paĝoj. Broŝ. 3.50 gld. Bind. 6.25 gld.

MALSATA ŜTONO

de Rabindranath Tagore

Tradukis el la bengala lingvo L. Sinha.

Ilustraĵoj de Sukhamoy Mitra.

La sep rakontoj kondukas la leganton en veran hindan atmosferon, foje fean kaj fantazian, kun la nebulaj pentraĵoj de revo kaj sonĝo, foje realecan, kun la premo de la lando kaj de la klimato (la pluvsezono, la riveroj), kun la peno de la homoj, la laboro de la vilaĝanoj, la fremdeco de la kasto.

(El recenzo en Heroldo).

La verko estas libro n-ro 1 en la Serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de UEA.

128 paĝoj. Broŝ. 8.50 gld. Bind. 11.50 gld.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO Malmö 7

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.

La plej ofte aperinta

La plej rapide informanta

Esperanto-gazeto

HEROLDO

DE ESPERANTO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Aktuala filmkolono
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj


jarabono : 4 \$ (53,3 steloj)

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio : 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino : Ada Fighiera-Sikorska

Aperis en oktobro!



La kvaronjara kultura revuo de U.E.A.

Jarabono 15 ned. gld. (60 steloj)